


OOMOTO



Majo

1935

Oomoto Centra Oficejo

Kameoka Kioto-hu Japanujo

INTERNACIIA

OOMOTO-MOVADO

DEVENO kaj CELO: La vorto **Oomoto** signifas Grandan Originon. La Granda (aŭ Origina) Dio, Kreinto de la Universo, aperis en la sankta loko Ajabe (Japanujo) en la jaro 1892 kaj deklaris pere de Sinjorino **Nao Deguĉi** Sian planon por la reformo de la mondo. Ni nomas Ŝiu la **Fondintino** de Oomoto. La Dia Reformplano konsistas en la starigo de pli perfekta mondo, verdire la ĉielregno baldaŭ venos sur la tero. Oomoto-Movado fervore laboradas por la baldaŭa efektivigo de la Dia Plano.

NUNA STATO de OOMOTO: Post la ĉieliro de la Fondintino, nia movado daŭrigas la agadon sub la aŭtoritata gvidado de Majstro **Onisabro Deguĉi**, adoptita filo de la Fondintino. Li estas eksterordinara homo, vera geniulo, eminenta en diversaj artoj kaj sciuj. La nuna mondo baraktas meze de ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj aliaj malsanoj. Ni firme kredas, ke nia spirita Gvidanto estas la de Dio destinita Homo, sole kapabla piloti la ŝipon de la homaro el inter la rifoj de hodiaŭo al la paca haveno de morgaŭo.

La Centro de Oomoto sin lokas en Ajabe, la Administrejo en Kameoka (Japanujo). Lokaj Centroj estas en Mukdeno kaj San Paŭlo, kaj pli ol 2,000 filioj ekzistas ne nur en Japanujo sed tra la mondo. Krom pluraj japanlingvaj organoj, monata gazeto «Oomoto Internacia» aperas en Kame-

oka. Nia Doktrino estas tolerema: ni unuiĝas kun Orientaj potencaj spiritmovadoj kiel Tao-Yuan kaj Universala Ruĝsvastika Asocio; ni ankaŭ kunlaboras kun pluraj spiritaĵaj kaj religiaj movadoj — Tsaili-Hui, P'uch-Hui, Anching-Chao, Lamaismo en la Oriento kaj Blanka Frataro, Grandega Mond-Kristana Spiritualista Ligo en la Okcidento. Ni ankaŭ fondis Universalan Homaman Asocieton kaj Ligon de Religioj, kiuj bone laboras por la mondopaco. Ni vokas al la tutmondaj gesamideanoj je komuna kunlaborado por pli bona kaj pli bela estonteco.

MAKSIMOJ: 1) Observu la veran aspekton de la Universo kaj konsideru, ke ĝi respegulas la **Korpon de Dio**. 2) Konsideru la senleran funkcion de la Universo kaj rekonu la **Forton de Dio**. 3) Konsideru la koron de la vivantaĵoj kaj komprenu ke ĝi estas koncipita de la **Animo de Dio**.

ĈEFINSTRUO: Dio estas Spirito loĝanta en ĉio de la Universo, kaj homo estas la reganto de la mondo. Kie unuiĝas Dio kaj homo, tie ekestiĝas senlima forto kaj aŭtoritateco.

DEVIZOJ: 1) Harmonio inter Dio kaj homaro. 2) Instruo pri Dia Vero. 3) Fundamenta moralo. 4) Sankta karaktero de la misio.

PRINCIPOJ: 1) **Pureco** de animo kaj korpo. 2) **Unuigo** inter klasoj de la socio. 3) **Optimismo** pri la aranĝo de Dio. 4) **Progresemo** por la socia plibonigo.

UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

CELO de UHA estas fratigo de la homaro sur la bazo de la Homaranismo. UHA celas plie labori por la efektivigo de la lumplena mondo, kie feliĉo kaj ĝojo floras por eterne. La homaro konsistas ja el gefratoj, kaj konkordo devas regi la tutan teron. Realigo de tiu ĉi idealo estas la plej alta celo de UHA. En la moderna epoko, la vivcirkonstancoj tute aliformiĝis, kaj la homa koro ĉiutage malpliboniĝas. Se oni permesas, ke tiu ĉi procedo daŭru, alvenos neevitebla katastrofo kaj la homaro multe suferos. Pro tio, ni kuraĝe eklaboru por disfaligo de la muroj inter nacioj, rasoj kaj religioj. Sur la bazo de Homaranismo, ni devas forigi la nunan kaoson kaj efektiviĝi pli luman, pli trankvilan, pli belan kaj pli feliĉan mondon sur la tero. Jen estas la celo de UHA.

UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO estas fondita, laŭ la iniciato de S-ro Onisabro Deguĉi en Julio, 1825. La Centro estas en Kameoka; S-ro O. Deguĉi estas la Prezidanto kaj S-ro Hide-

maru estas la Vicprezidanto.

Kvankam ĝia historio estas mallonga, la movado disvastiĝis kun mirinda rapideco sur la tuta tero: ĝi havas Azian Centron en Tokio, Manĉurian Centron en Mukdeno, Brazilan Centron en Uberlandia; krome pli ol 1,200 filioj troviĝas en la tuta mondo. Manpremane aŭ unuiĝinte kun samcelaj movadoj en Eŭropo kiel ankaŭ en Azio, UHA klopodas kunfandi la tutan homaron en unu familian rondon kaj efektiviĝi harmonian kunvivadon kaj kunprosperon de la tuta homaro «Zinrui-Aizen-Sinbun» estas organo por Japanujo: ĝi aperas en Tokio tri foje monate po ĉ. miliono da ekzempleroj. «Oomoto Internacia» estas internacia monata organo en Esperanto: ĝi fervore batalas por disvastigo de Homaranismo.

ALIGO al UHA restas libera kaj senpaga formalajo. Dezirantoj skribu rekte al la Centra Oficejo la nomon, adreson, aĝon kaj profesion.

OOMOTO INTERNACIA

MONATA ORGANO de OOMOTO-MOVADO kaj de UNIVERSALA HOMAMA ASOCIO

J a r o 1 1

M a j o 1 9 3 5

N-ro 5 (117)

Ĉefredaktoro: Koogecu Nišimura. Nia Devizo: «Internacia Redakcio — Internacia Legantaro». Por ĉiu artikolo respondas la subskribinto. Manuskriptoj ne petitaju ni ne resendus. Honorario ne pagebla; por artikoloj publikigitaj ni sendas pruvekzemplerojn. Pri abonkotizoj, ktp. vidu la lastan paĝon.

Adreso de Redakcio kaj Administracio: Oomoto Centra Oficejo, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

Mikado* kaj Parlamento

— Koogecu Nišimura —

Nuntempe okazas grava diskuto en la japana parlamento pri la rilatoj de Mikado kaj la ŝtato. La origino de la debato estas parolado kaj verkaĵoj de D-ro Tacukiĉi MINOBE, kiu famiĝis en juristaj rondoj pro sia t.n. «institutia teorio». Laŭ tiu teorio** Mikado regas ne kiel privata persono sed kiel Institucio. La jura fonto de la privilegioj de Mikado estas ne ia persona rajto sed interesoj de la ŝtato. Konsekvenco de tiu ĉi vidpunkto estas, interalie, ke soldatoj batalas ne por Mikado sed por la nacio.

Tuj post la parolado de D-ro MINOBE aŭdiĝis protestaj voĉoj kaj en la Parlamento kaj dise en la lando. La okcidenta ideologio aplikata al la japana politika strukturo evidente ne kontentigas la publikon. Ĉar D-ro MINOBE estas lerta juristo, estas malfacile kontraŭstari lin per argumentoj sed la sentoj de l' japanaro ribelas kontraŭ la konsekvenco de lia doktrino.

La nuna ministroprezidanto, admiralo OKADA deklaris en la Parlamento sian nekompetentecon jure refuti la tezon de D-ro MINOBE sed li tuj aldonis, ke kiel maristo li nepre kontraŭstaras ĝin. Kontraŭ

tiu «institutia teorio» iom post iom elformiĝis ankaŭ logika, jura argumentaro, kiu tute mirinde koincidas kun la *familia sistemo* jam anoncanta de Oomoto.

Laŭ tiu ĉi «familia teorio» la japana nacio estas vasta familio, kies ĉefo estas Mikado. Tiel estis de la origino kaj la japanaro ne estas imagebla sen la Familio de Mikado, kies infanoj estas ĉiuj japanoj — en la vasta senco de la vorto, kompreneble. Soldato batalas do por Mikado, ĉar sen Li ne povas ekzisti la japana Ŝtato.

La leganto en demokratiaj landoj eble ridetos pri tiu ĉi akademia diskuto, kiu eĉ ne tuŝas la principon mem de l' imperia sistemo kaj tamen pasie interesas la japanan publikon. Ĝi estas pruvo por la profunde enradikiĝinta estimo al la Trono ĉe japanoj, estimo kiun neniel ŝancelas juraj argumentoj. La fakto, ke ĉiu opinio kontraŭa al la tradicia kredo pri la unueco de Mikado kaj ŝtato elvokas laŭtan kaj instinktan proteston, pravas, ke la japana spirito estas ankoraŭ vivanta kaj ke ĝi energie kontraŭstaras ĉiun asimilon flanke de ideoj enportitaj de eksterlando.

Meze de l' ĝenerala, teknika imitado estas refreŝige konstatita tiel puran manifestiĝon de spirita sendependeco.

* Japana Imperiestro, laŭ P.V.

** Ni kontraŭstaras tian teorion.

Lojaleco kaj Patriotismo

— Waiči Saito, A. M. —

Japanaj aferoj senescepte prezentas al vi malfamiliarecojn mensan kaj fizikan, kaj mensa malfamiliareco estas tiom pli malfacila por vi kompreni. Unu el tiuj-ĉi mensaj aŭ intelektaj specialecoj, kiujn vi ne povas senti ĝisfunde, estas lojaleco kaj patriotismo. Kompreneble, lojala kaj patriota sentoj estas komunaj al ĉiuj homaj gentoj, kie ajn ili vivas, aŭ en Islando aŭ en Antarkta regiono. Sed la lojaleco kaj patriotismo, kiujn la japanoj entenas en sia koro estas tute romantikaj kaj samtempe religiaj, malsamaj de tiuj de aliaj rasoj malgraŭ eksterajo. Lojaleco, t.e. sindona fideleco al konstitucia aŭtoritato, kaj patriotismo, t.e. amo kaj sinofero al sia propra lando, estas la sentoj ĉie-estantaj komune en ĉiuj rasoj, de la Hottentotoj en la afrika ĵangalo aŭ al la ĉarmaj *mesdemoiselles* en Parizo. Tial mi ne allasas la japanojn pretendi, ke ili estas solaj posedantoj de lojaleco kaj patriotismo, sed mi supozas, ke ili havas rajton propagandi kaj vendi tiujn ĉi aferojn kun fabrikmarko «*Made in Japan*» (japana fabrikaĵo), ĉar mi scias, ke la lojaleco kaj patriotismo faritaj en Japanujo estas, kiel mi jam diris antaŭe, tute malsamaj al ĉiuj kun alilandaj markoj, en ilia esenca valoro. Eĉ se ne ekzistus Monto Fuji, aŭ geĵoj, aŭ ĉerizfloroj en Japanujo, Japanujo restus Japanujo ĉiam same kaj nenion suferus. Sed se oni ekstraktos lojalecon kaj patriotismon de la japanoj, tiam ili estos nur homfiguroj aŭ kvazaŭhomoj, kiuj neniam timigas kornikojn. Tiom ke lojaleco kaj patriotismo estas sinonimoj de la japana popolo. Rigardu en la japanan historion kaj vi trovos tie, ke lojaleco kaj patriotismo estas kerno aŭ fokuso de ĉiuj eventoj priskribitaj en ĝi. Ĉiuj japanoj, junaj aŭ maljunaj, estas bone penetritaj de la fama rakonto pri Masaŝige Kusunoki,

kiu estas adorata kiel dio kaj enkarniĝo de lojaleco kaj patriotismo, apoteozata ĉe Minatogaŭa apud Kobe.


*

Estis antaŭ ĉ. 600 jaroj (t.e. tri jarojn antaŭ la Centjara Milito inter Anglujo kaj Francujo) kiam en Japanujo la perfidulo Takauĵi Aŝikaga intencis minaci la Imperiestron Godaigo kaj meti la tutan Japanujon sub sian kontrolon, uzurpante la potencon super la japana nacio. Masaŝige estis venigita antaŭ la Imperiestron Godaigo kaj ricevis edikton por malhelpi la militiron de Takauĵi, kiu estis marŝanta al Kioto ĉe la fronto de l' armeo^① sufiĉe potenca dispremi la imperian gvardion per unu bato. Masaŝige, kun sia frato, kolektis sian armeon^② kaj haltis ĉe Minatogaŭa, apud Kobe de hodiaŭo, por batali kontraŭ Takauĵi. Sur sia vojo al Minatogaŭa li haltis ĉe Sakurai, kaj tie li diris al sia plej aĝa filo, Masacura, «Vi estas nun dekunu-jara kaj mi kredas ke vi komprenas kion mi diras al vi. Kiel vi scias, tiu ĉi batalo kontraŭ Takauĵi estos senespera (malsukcesa). Tial mi pensas, ke mi plu ne povos vin revidi en tiu-ĉi mondo, ĉar se mi estos venkita de l' malamiko, mi tuj faros *harakiri* anstataŭ cedi. Tial vi reiru al via hejmo kaj atendu ĝis vi fariĝos matura viro kaj tiam vi batalu por la Imperiestro, kontraŭ la perfidulo. Nu, mia kara, tio ĉi estas memoraĵo, kiun mi volas doni al vi». Tiel dirinte Masaŝige transdonis al sia filo la glavon donacitan de l' Imperiestro. Poste li marŝis al Minatogaŭa kun decido, ke li tie mortos por la bono de l' Imperiestro. La milito

① konsistanta el ĉ. duon-miliono da soldatoj

② konsistanta el nur 700 soldatoj

inter la du armeoj estis tiel furioza kaj terura ke ĝi daŭris de mateno ĝis nokto, ĝis finfine la armeo de Masaŝige estis preskaŭ tute buĉita, escepte nur sepdek tri soldatojn. Ankaŭ Masaŝige vundiĝis tiel multe ke li ne plu povis komandi, tial li decidis retiri sin ĝis malgranda vilaĝo apud Minatogaŭa, kie li laŭtvokis sian fraton, «Nun, kara frato, ĉu vi havas ion diri por adiaŭi al tiu-ĉi mondo?» Tiam la frato respondis, «Sep fojojn revenante al tiu ĉi mondo, mi volegas ekstermi la ribelulon», kaj li ridegis el fundo de l' koro. Aŭdinte tion ankaŭ Masaŝige ridis kaj respondis, «Bone, kara frato, ankaŭ mi tute samopi-



Masaŝige Kusuoki,
ludata de l' fama aktoro
Sadafuji Iĉikaŭa.

nias; nu ni nin mortigu», kaj la du fratoj mortigis sin reciproke, per glavoj pikeginte unu la alian. Tion sekvis liaj soldatoj, kiuj ĉiuj estis volontaj makuliĝi per la sango verŝita por glorigo de lojaleco kaj patriotismo.

Karaj legantoj, mi ne provas impresi vin per la morala sento kiun la popolo de tiuj tagoj entenis en sia koro, sed mi volas emfazi la spiriton, kiun ili manifestis en siaj agoj — la sinofero por tio, kion ili konsideris bona kaj justa — viktimgo de siaj vivoj por la bono de l' kunhomoj.

Mi ofte ricevis la demandon de l' fremduloj, ĉu kiuj mi interkontaktiĝis, kial la japanoj estas tiel bravaj en la milito kaj tiel lojalaj al la Imperiestro kaj tiel patriotaj al sia propra lando; kaj mi opinias ke tia demando ĉe ili estas tute natura, ĉar ili ne povas vidi la veran koron de l' japana popolo el ĝia fundo. Kelkaj el ili pensas ke la japanoj estas bravaj ĉar ili ne estas tiel alte civilizitaj kiel la okcidentuloj, aŭ ĉar ili manĝas rizon kaj peklitajn prunojn, kiuj, kune-metitaj en lunĉo-keston reprezentas la nacian standardon, aŭ ĉar ili konsumas multe da fiŝoj kaj marherboj ĉiutage, kiuj entenas ĉiuspecajn vitaminojn, necesajn por sano. Kompreneble tiaj interpretoj estas tute supraĵaj. La japanoj estas bravaj, ĉar ili naskiĝas tiaj, ili estas lojalaj kaj patriotaj ĉar ili edukiĝas fariĝi tiaj. Sed, devas esti certaj pli profundaj signifoj ol tiuj, kaj kelkiuj dirus: Certe, troviĝas! Ili naskiĝas bravaj, lojalaj kaj patriotaj, konforme al la leĝo de heredo, kiel ili heredis la ideon pri lojaleco kaj patriotismo de post la unua Imperiestro Ĵimmu fondis Japanujon kiel nacion en 660 a.K. De tiam, la japanaj regatoj rigardas la Imperian Familion kiel sian ĉef-hejmon, de kiu ĉiuj familioj en la japana Regno elvenis. Pro tio ĉiu japano pensas ke esti lojala al la Imperiestro kaj patriota al sia propra lando estas tiel same kiel ni

estas file-fidelaj al niaj gepatroj kaj sinceraj al niaj kunhomoj. Kaj kiu ne estus fidela al siaj gepatroj, se li ne estus idioto aŭ frenezulo? Tiamaniere, la japanoj, ĉiuj senescepte, nur povas esti lojalaj al la Imperiestro kaj patriotaj al sia propra lando.

Kiel mi jam diris antaŭe, la lojaleco kaj patriotismo de la japanoj estas tute romantikaj kaj unikaj el la historia vidpunkto, tute religia kaj transcenda el la vidpunkto de la nacia morala sperto, kaj defias logikan analizon. Tamen tiuj-ĉi sentoj estas parto de karakterizoj kiuj konsistigas la spiritan vivon de Japanujo, kaj mi kredas,

ke tiuj kontribuos ion por la venonta civilizo kiu superos la nunan tro materialisman.

Elan, ĵigis N. TAZUO

Noto de l' Tradukinto : La 25-a de Majo de tiu ĉi jaro estas la 600-a datreveno de la heroo morto de l' granda Kusunoki, en la batalo de Minatogaŭa (apud Kobe). Oni okazigis memor-feston por tiu brava lojalulo, tra la lando. La programo komenciĝis de la 1-a de Aprilo. Ĉe la fino mi aldonas, ke li estis lojalulo ne nur brava, sed inteligenta, humana kaj homama, kaj en li la japana popolo vidas la tipon de l' japano kun vera japana spirito.

Orienta Filozofio

(4)

— *Jamato Masaharu* —

Orienta Fiziko.

Jam *Gautama Budho* diris, ke «scienca kono produktas mezan homon, blindigitan de kompatindaj deziroj.»

Lao-Ĉe deklaris siavice, ke la «scio estas febro». Li ankaŭ diris, ke «scienculoj havas nevenkeblajn malfacilaĵojn por kompreni la Vojon (TAO), kiun la sensciuloj facile praktikas.»

Tiu ĉi lasta rimarko komprenigas al ni la profundan sencon de la supra parolo de BUDHO. Ĝi ankaŭ klarigas, kial ne ekzistas plene ellaborita sistemo de «Orienta fiziko» laŭ modelo de la eŭropa scienco, kiu *studas la proprecojn de la korpoj kaj la fenomenoj** Efektive, fiziko estas nenecesa por *perfektaj* orientanoj, ĉar ĝi kasiĝas latente en la Orienta Filozofio. Nur kiam orientanoj malprogresas, en la spirita senco, nur kiam ili ne plu kapablas tiri el sia intuicio la konsekvencojn necesajn por la regado de la korpe-fenomena

mondo, nur tiam ili bezonas studi okcidentan fizikon. El tiu ĉi vidpunkto la grandioza materia progreso en moderna Japanujo aperas kiel spirita malprogreso.

La antikva orienta arkitekto ne studis geometrion: li majstre sciis la regulojn necesajn por sia arto sen ia ajn lernado (escepte empirian spertadon — sed ĉu tiu sufiĉus al modernulo por konstrui majestatan pagodon kiu samtempe rezistas al tertremoj?). La antikvaj orientanoj eĉ malestimis la utilecajn konojn el pure morala vidpunkto. Ĉina kamparano klarigis sian primitivecon, laŭ *Konfucio*, tiamaniere:

«Mi ne uzas levilon por akvumi mian kampon ĉar oni povas kompreni la veran sencon de TAO nur per la laboro. Tial oni devas sin liberigi de ĉiu utileca kono.»

Se la antikvaj orientanoj ne instruis sisteme la natursciencojn, pro la supre menciitaj kaŭzoj, el tio ne sekvas, ke ili ne konis la leĝojn de la Naturo. Ni montros ĉi sube kelkajn praktikajn ekzemplojn por pruvi kiamaniere ili alvenis al «sciencaj» rezultatoj per pure intuicia vojo.

* difino de la Plena Vortaro.

Gravitado

Gravitado estas la granda leĝo de la okcidenta fiziko, leĝo kies funkciado estas ĉiompotenca kaj ĝis niaj tagoj mistera. Tiu ĉi leĝo estis malkovrata nur en la Nova Epoko de l' eŭropa historio, de NEWTON (KEPLER kaj KOPERNIKO antaŭvidis ĝin ĝis certa grado). EINSTEIN pruvis ke eĉ la senmateria lumradio obeas al la «leĝo de la reciproka altiro de korpoj en la Universo», kiel difinas ne tute ekzakte la Plena Vortaro. Ĝis nun oni ne sukcesis prui, ke gravitado bezonas tempon por disvastiĝi; oni ankaŭ ne scias en kia medio ĝi disvastiĝas; plie, la naturo mem de l' gravitado estas profunda mistero al okcidentaj astronomoj. Okcidenta Fiziko nur studas la fenomenojn el ekstere. Orienta Fiziko studas la internan naturon de la korpoj, la motivojn kiuj necesigas la fenomenojn. Jam en la antikveco la orienta saĝeco komprenis la gravitadon pli intime ol la nuntempaj fizikistoj ĝin komprenas.

Laŭ la fundamenta leĝo de l' *Inologio* IN altiras YO. Tiu ĉi altiro mem estas GRAVITADO. YO korespondas al la centripeta kaj IN al la centrifuga fortoj. Sen komplika kalkulado la *inologo* imagas la korpojn reduktitajn al centraj punktoj: li spirite vidas, kiamaniere la forto radias en ĉiujn direktojn el tiuj centraj punktoj, kvazaŭ regule ŝveliĝantaj globoj. La volumo de l' globo estis jam multe pli frue kalkulata de l' ĉinoj per pure intuicia metodo. Se do la «gravitado» estas imagata kiel regule disvastiĝanta globo, oni povas dedukti, ke ĝia efiko estas inverse proporcia al la kvadrato de l' distanco (kiu estas la okcidenta difino).

Astronomico,

Mehaniko, Matematiko.

Estas fakto, ke la antikvaj ĉinoj antaŭvidis eklipsojn. Estas ankaŭ fakto, ke iliaj astronomiaj konoj venis ne tiom el observado kiojn el meditado,

Alia fakto estas, ke la ĉinoj inventis la unuan kalkulmaŝinon, la abakon, kiun la japanoj perfektigis: la «Soroban» tiel ĝenerale uzata en la nuna Japanujo ebligas aritmetikan kalkuladon kun malpli da laciĝo kaj pli da ekzakteco ol la tiel «logikaj» aritmetikaj procedoj de l' eŭropanoj. Sed eble eĉ multaj japanoj-edukituloj ne scias, ke «Soroban» permesas algebrajn kaj eĉ diferencialajn kalkulojn kaj plie, eĉ tiuj kiuj scias la laste menciitan fakton ĝenerale ne scias, ke la antikvaj ĉinoj solvis integralajn ekvaciojn helpe de bastonetoj... la samaj kiuj servis por la laŭvida klarigo de IN kaj YO.

Por la ekzisto de antikvaj, meĥanikaj konoj en la Oriento servas la japana pafarko kaj la japana glavo. La unua kontentigas ĉiujn postulojn de la leĝoj de fleksebleco kaj rezisto; la dua estas majstroverko de metalurgio. La antikva, japana glavo estis ĉiam forĝata en montaro (la vira elemento tie abundas, ĉar la maro estas malproksima) kaj la materialo estis Fe^3O^4 kiu estas neutiligebla laŭ la nuntempa metalurgio. La rezultato estis tamen tia glavo, kies kvalitoj defias la lertecon de l' nuntempaj teknikistoj, ja eĉ tiun de l' modernaj, japanmanieraj glavforĝistoj. (*daŭriĝo*)

Pensoj

Kiu konas aliajn homojn, estas prudenta. Kiu sin mem konas, estas eminenta. Kiu venkas aliajn, estas forta. Sed kiu sin mem venkas, estas potenca. Kaj, kiu mortante, scias, ke ne pereos, — estas eterna.

LAOĈE

* * *

La malsano, kiu turmentas la homaron, estas manko de amo kaj foresto de altruismo. Sen amo kaj konkordo neniam estos progreso aŭ prospero. Neniam okazos plibonigo, neniam interkonsento inter la homaro, se la sentemo de homoj ne estos vigligata de iu potenco.

ABDU'L BAHA

ORA SPEGULO

de Majstro Onisabro Deguĉi



«Parolo estas arĝento», sed «Parolo en Ora Spegulo estas diamanto». Ora Spegulo estas kolekto de l' vortoj de Majstro O. Deguĉi. La Red.

Dio kaj Gustumo

Oni diras, «Skribo ne elĉerpas parolon, parolo ne koron, koro ne veron*». Tiom pli grandioza estas la Aŭtoritato kaj Vero de Dio, ke Li ne estas elĉerpebla per koro. Dio estas neklarigebla, samkiel la dolĉeco de sukero estas nekonigebla al tiu, kiu neniam ĝin gustumis.

Preĝoj de eksterlandanoj

Vi scias, ke kiam mi ripozas, mi aŭdas multajn voĉojn de preĝoj aŭ petoj el diversaj lokoj kaj intertempe mi ege suferas korpe. En la lasta tempo miksaŭdiĝas pli kaj pli da voĉoj de eksterlandanoj. Ne plu estas por mi tiel facile kiel antaŭe, rekoni voĉon, de kiu ĝi venas, ĉar tiom multsvarme aŭdiĝas en sama momento.

Karaktero kaj Dormado

La karaktero de iu estas rekonebla, se oni vidas lian vizaĝon dum li dormas. Bonuloj dormas kun mienoj tre bonkvietaj, dum malbonuloj kun malicaj. Dormantoj kun okuloj malfermitaj estas krimuloj. Iliaj gardospiritoj gardas kontraŭ danĝero, ĉiam persekutataj de iuj.

Obeemo

Mi ne estas blindulo. Mi scias la estontecon. Kiu ne povas vidi la estontecon, venu post mi ĝentile. Nur sekvu min obeeme kaj tio sufiĉas.

Leono kaj Rato

Vivanta rato estas miloble pli forta ol

leono mortinta. Eĉ la leono, reĝo de l' bestoj, fariĝas senforta kiam ĝi mortas. La rato, kiel ajn malgranda ĝi estas, laboregas dum ĝi vivas. Oni konstatu la rezonon de l' supra fakto. La homoj estas la plej respektindaj en la homa mondo! Dio volas plenumi sian Reformplanon per homoj, sed ne per la mortintaj! Fondintino de Oomoto, Nao DEGUĈI estis grandioza persono, sed la vivanta nun mi estas pli aktiva ol ŝi, kaj en la estonteco, kiam mi ĉieliros, mia heredonto HIDEMARU estos pli aktiva ol mi.

En la frua periodo de l' Oomoto-movado la Dia entrepreno estis treege malhelpata de l' bigotoj, kiuj malobeis al mi, partiece persistante je la vortoj, kiujn diris la Fondintino dum sia vivo surtera. La mond-stato ŝanĝiĝas. Konforme al la evoluo de l' mondo, se ni ne marŝas antaŭen, ni ne povas progresi nek evolui. Por gvidi la epokspiriton de l' mondo Dio sendas sur la teron taŭgan personon, por ke la Dia Reformplano efektiviĝu. Oni bone penetru la pravecon de tiu-ĉi punkto.

Intelektio kaj Emocio

«Emocio estas blinda. Ĝi ne scias kien ĝi iras, se ne kontrolas ĝin la kvietia intelekto. Kiu agas nur de emocio pereigas sian familion kaj sin mem finfine». Tian skribon mi legis en *Asahi** kiam mi ankoraŭ estis dekkvar- aŭ dekkvin-jara, kaj tion mi memoras hodiaŭ. La skribinto de l' supra frazo estis pseŭdonime *Ucunomija-Cukubano*. Lia tezo ne nur plaĉis al mi

* t.e. parolo estas neesprimebla ĝisfunde per skribo, ktp.

* plej granda tagjurnalo japana

sed ĝi tuŝegis mian animon. Estas vero, ke la homo ne devas agi, stimulate nur de emocio. Li ĉiam devas konsulti sian intelekton. Por mia sankta laboro mi rezignis eĉ mian unuan amon. Por mi tio estis preskaŭ neeltenebla sufero. Ne juna, mi tamen sentas doloron ĝisoste, kiam mi rememoras tion. Sed jam en tiuj tagoj mi rekonis iugrade, ke Dio destinas al mi grandiozan mision kaj tial, starante ĉe vojkruceto de amo kaj sankta laboro, mi min turnis al la lasta, forĵetinte la unuan, laŭ dikto de mia intelekto. Dia Reformplano min okupas hodiaŭ. Por efektiviĝi Dian entreprenon mi ĉiam estas preta fordoni min — mi ne zorgas eĉ forĵetante mian familion! Oni devas esti preta ĉion oferi, se tio faras bonon al la sankta laboro. Estas diversaj cirkonstancoj, en kiuj oni sentas nepriskribeblan afekcian doloron, kaj tamen oni devas posedi feran volon kaj klaran intelekton por trabati ilin.

«Kan'nagara-tamacihaemase!»

Tio estas la preĝvorto al Dio en la senco, «Ni (aŭ mi) preĝas, ke niaj animoj fariĝu pli kaj pli bonaj konforme al Via volo!» Kiam tion oni recitas antaŭ altaro de l' prapatraj spiritoj, tio estas la preĝo *ne al sed por* la prapatroj, ke Dio ilin favoru!

Amikoj maljunaj

De la knabeco mi havis multajn, maljunajn amikojn, aŭ pli ĝuste, mi intence amikiĝis kun ili. Ĉar mi volis sorbi sciojn bazitajn sur iliaj longaj spertoj. Maljunuloj scias diversajn spertojn de almenaŭ kvardek- aŭ kvindek-jara tempodaŭro. Siavice ili devus esti sorbintaj la spertojn de siaj gepatroj, tial ili konservas ĉ. centjaron da spertoj de l' vivo. Ĉu ili ne estus bonegaj liverantoj de fekundaj scioj por ni? Kion oni povus profiti utilan nur el inter samaĝa junularo? Nur diboĉon kaj maldecon oni lernas de amikoj. La kontakto kun maljunuloj estis unu el la principoj de mia fruara vivo.

Majstroverko de Dio

El ĉia kreitaro, la korpo de l' virino estas la plej majstra verko de Dio. Gracileco de l' virinkorpa konturo. Due, la korpo de l' viro. Tria, la ĉevalo. Do la ĉevalo estas Lia majstroverko de l' bestaro. Tial la ĉevaloj troviĝas en ĉiuj ŝinto-sanktejoj, kiel servantoj al Dio.

Profesio kaj Misio

La homa misio naturdotita de Dio estas komuna ĉe ĉiuj homoj: plenumi la devojn kiel filoj de Dio, kiel vivantaj kapeloj de Dio. Sed iliajn profesiojn Dio ne destinas. La homoj ekzameni sin mem, por kia profesio ili plej taŭgas per sia talento kaj kapableco kaj prudente elektu ĝustajn okupojn por si.

Tempo por fiŝ-hokado

Ĉirkaŭ vesperiĝo estas la plej bona horo por fiŝ-hokado. La fiŝoj ne scias, ke morgaŭ matene levigis la suno. Kiam venas vespera krepusko, ili pensas ke la mondfino alvenis kaj avide traserĉas manĝaĵojn por ne perdi ŝancon!*

Pri medikamento

«Se medikamento ne bonefikas post unufoja engluto, ĝi neniam efikas finfine. Nenio estas pli stulta ol pensi, ke dum longedaŭra prenado medikamento bonefikos. Pipro estas pika, se oni ĝin manĝas eĉ iomete. Se bonefika, tio devus bonefiki per unu fojo. Se ne-efika, tio nur kaŭzos kontraŭefektojn dum ripetata prenado» — tiel Dio diris al mi.

Vivo kaj Dentoj

La dentoj havas gravan rilaton kun la homa vivo. Unu dento korespondas al dek-jara vivo. Tial se dento defalis, oni devas tuj dentumi. La homoj laŭ sia naturo devus vivi ĝis tricent-jara aĝo.

Oni elparolas la ideografiaĵon 齒 (dento) *johai*. *Jo* estas 世 (unu generacio) kaj *hai* estas 榮 (prosperi, vivi). La dentoj estas patroj de l' vivo. Sen dentoj la homo pli kaj pli malgrasiĝos.

* metu fiŝetojn en vazon kaj kiam la akvo kaj fiŝoj kvietigis, vi vidos, ke la fiŝoj naĝstaras fronte al unu sama direkto, kvazaŭ manovrantaj aeroplanoj. Nia Majstro iam klarigis al mi, ke eĉ la fiŝoj nature sin direktas al la Suno!
—Trad.

Komence estis la Vorto . . .

Moderna balado en antikve japana stilo

de K. ŜIRAKI, Nagoja.



S-ro K. Ŝiraki

Klarigo de l' Tradukinto :

Vive estas ankoraŭ en mia memoro la Zamenhof-Festo de l' Nagoja Esperantistaro okazinta en la Y.M.C.A. lastan jaron. Eĉ unu vorton de la paroladoj mi jam ne memoras (inklude la proprajn vortojn!) sed neforgeseble restas en mia koro la grandioza, arta produkto, kiun virtuoze prezentis Sinjorino *Ogawa Kyokuten*, artistino de BIWA (japana muzikinstrumento, speco de liuto). La teksto de tiu ĉi balado estis verkita de nia samideano K. Ŝiraki, pioniro de Esperanto-movado en la urbo Nagoja. Kvankam mi nur malmulte komprenis la sencon de tiu malfacilega klasika komponaĵo, ĝia atmosfero profunde impresis min. Refoje mi anime spertis la grandiozecon de la japana kulturo.

Traduko de tia japana klasikajo estas

Oni pensas, ke la lango gustumas ion. Sed la fakto estas, ke la dentoj kaj lango gustumas distingante manĝaĵon. La t.n. tranĉ-dentoj estas la plej gravaj, ĉar ili apartenas al «*saĝeco*» de l' homoj. Oni ĝenerale pensas, ke la tranĉdentoj servas por distranĉo de fadeno (en japana lingvo oni nomas ilin *faden-tranĉdento*) sed oni eraras. Ili estas dentoj de *saĝeco*, kiuj solvas plektiĝon de aferoj, problemoj . . . Estas malbone senigi ilin. *Trad. N. Tsuruzo*

dekoble malfacila afero. Antaŭ ĉio, je lego oni nek vidas nek aŭdas la artistinon. Necesus esti granda artisto por elvoki per teksto tradukita la samajn sentojn, kiujn inspiras la viva prezentado de la verko. Mi ne pretendas esti tia artisto. Tamen, post kelkfoja interkonsiliĝo kun la aŭtoro mi esperas, ke mi sukcesas komprenigi almenaŭ etgrade la impreson faratan de tiu ĉi balado al *animoj influeblaj*. Jen la muziko; aŭdu :

*

*Komence estis la Vorto kaj ĉio el ĝi originas;
Skrivo permesis la naskiĝon de l' Kulturo.*

*

*Simile al la misteraj rilatoj la stelojn regantaj
Pulsas en homaj koroj sento de Harmonio.*

*

*Lastatempe estiĝis fine Civilizo ;
Radio kaj aviado malgrandigis la mondon.*

*

*Ve! Ho milfoje ve, ĉar homoj kulturitaj,
Homoj Civilizitaj ne interkompreniĝas!*

*

*Admonoj de saĝuloj, dolĉaj poemoj, belaj
kantoj:
Surdaj estas la oreloj kiuj vin aŭskultas...*

*Post longa nokto venis tamen krepusko!
Simpla, brava, nobla junulo Zamenhof stariĝis.*

*

*Pro amo al kunhomoj medicinon li studis
Sed pli li plenumis ol simplan korpan savon.*

*

*Ĉar pro monda la doloro lia koro sangis
Kaj Dio enloĝis en la vunditan koron.*

*

Ĉu sonĝo? Ne, realo tutvera:

Al la muta homaro lingvon li donis.

*

Kaj same kiel la Fortego la mondon reganta
Fortigas kverkon: la Lingvo enradikiĝas.

*

Vintraĵ ventegoj ne povis detrui la radikon
printempan:
Dum uraĝanoj fortiĝas radikoj nerimarkate.

*

Ni do estimegu la Pionirojn, prapatrojn
de l' Ideo Mondlingva
Ĉar ili semis en tempo antaŭa vizie vidante
la rikolton!

*

Branĉo plej juna — branĉo plej ŝatata!
Simile, nia Ideo en la Lando de l' Sun'
leviĝanta...

*

Eĉ se ventego forŝiros la branĉon Okci-
dentan,
Nova vivo ĝermos el la branĉo Orienta.

*

Same kiel la filoj de Nipponlando adoras
prapatrojn
Kiuj dum tri jarmiloj elfaris la Imperion,
En ilia koro dankema, fidela al tradicioj,
La amo al Zamenhof neniam pereos!

*

Tial ni ne ĉagreniĝu pro momentaj fiaskoj
Sed kantante preparu nin al novaj ba'aloj.

*

Ĉar Dio nin benos se ni donos al la Homaro
Rimedon de kora interkompreniĝado.

*

Unuigi okcidentan civilizon kun orienta
kulturo:
Jen estas misio de l' japanoj.

*

Ĝis la lasta filo de l' Imperiestro vivos
La verda standardo jam ne povas fali.

*

Eĉ se la falanĝo de l' vicbatalantoj rompiĝos,
La dua vico okupos la tranĉeojn — ĝis la
lasta,

*

Le verda standardo triumfe antaŭeniros
Ĉar neniam Nippon estis ankoraŭ venkita.

*

Eterne venkas kiu batalas por Bono;
El lia kadavro ĝermas kverko nobla.

* * *

Epilogo de l' Tradukinto:

Oni imagu la dramajn akcentojn, la interludojn, la trankvilan, tragediecan prezentmanieron; plie oni konsideru, ke la aŭtoro tuŝas la plej senteman kordon de la japana animo, tiun de l' patriotismo. Se oni tion imagas, oni komprenos, ke Sinjoro K. Ŝiraki estas pioniro en pli ol unu senco en la japana Esp-movado. Venos tempo kiam li estos ĝenerale komprenata. Ni esperu, ke venos ankaŭ tradukistoj pli kapablaj ol via servanto... J. Major



S-ino Ogawa Kyokuten
konata artistino de japana liuto «Biwa» en Nagoya.

Animo rilatas kun Korpo

— Hidemaru Deguči —

LA homoj naskiĝas. Tio ne estas kreo nur de l' homoj, nek de ilia volo. Se efektive kapablas la homo krei la homon, li devus krei lin ĝuste tia, kian li antaŭsupozis. Ofte la realo montriĝas kontraŭa. La homoj partoprenas — nur duone. Jen sekvas alegorio inter najlo, martelo kaj brako.

— Najlaĉo perfortas sin enpuŝi en mian korpon. Fi, kanajlo! — diras s-ro Ligno.

— Ba! Mi enpuŝiĝas per stranga forto. Oh, Martelo bategas mian kapon! — krias s-ro Najlo.

— Kio okazas al mi, ke mi tiel bategas la kapon de Najlo? Hum! La tenilon de mia korpo kaptas la homa mano. Ĉu ĝi perfortas min? — demandas s-ro Martelo.

— Kial mi devas svingadi la manon? Verŝajne, venas la ordono de iu supera mastro kaj mi partoprenas nur duonvole! — komprenas s-ro Brako...

Tra la tuta korpo oni ne trovas la motoron, oni do iras al la nervaro. La nervaron funkciigas la homa spirito. La homan spiriton funkciigas alia pli supera spirito. Tiamaniere la rilato alten daŭras senfine...

Mi parolis per parabolo. Ĉio en la mondo konsistas el vertikalaj *rilatoj*. Oni ion faras aŭ plenumas, sed efektive, *per propria volo duone, per fremda povo duone!* Tion la scienculoj ne rekonas.

Koleron en koro montras la vizaĝo responde. Se glacieron oni varmigigas, la akvo tiom fariĝas. Kiam la akvon oni boligas, fariĝas tiom da vaporo. Glacio, akvo kaj vaporo — ĉio ĉi estas substance malsimila sed esence ne malsama — nur ŝanĝiĝo de stato aŭ formo. Tia estas ankaŭ la rilato inter la spirita kaj materia mondoj. Se oni povas frakasi glacieron per martelo, tamen vane la akvon! Tiel vane ankaŭ la aferojn

de l' spirita mondo oni povas rezonadi per homa racio de l' materia mondo. Sed ĉiuj homoj povas rekoni la ekziston de l' koro — povas konstati ke ili havas la animojn kaj la korpojn. Ili povas konjekti ankaŭ, ke animo kaj korpo rilatas unu kun la alia, tamen ambaŭ ne estas samaj.

Kelkaj miskomprenas ke *rilateco* signifas *koincideco*. Kvankam animo kaj korpo estas dualismo, tamen tio estas samtempe monismo. Se animo kaj korpo estus tute samaj, ambaŭ devus esti tute koincidaj. Sed vidu la fakton, ke la korpaj suferoj ofte ne (aŭ ne ĉiam) koincidas kun la spiritaĵoj doloroj.

La rilato inter korpo kaj animo — inter ordonanto kaj ordonato (obeanto) — estas vertikala ligiteco senfine daŭranta unu kun aliaj pli kaj pli superaj. Ekz. la vertikala ligiteco de ligno kun najlo, najlo kun martelo, martelo kun mano, mano kun brako, korpo, spirito... ĉiu el ili estas *aganto* kaj *movigato* de iu pli supera. La procedo, ke io plialtiĝas gradon post grado, estas la evoluo. La homo forlasas la materian mondon kaj eniras la spiritan mondon — tio estas evoluo de l' homo je unu grado! kvazaŭ la najlo fariĝus la martelo!

Animo kaj Korpo

Ni prenu fontoplumon. Por skribado utilas nek inko nek plumo sole. Nur kiam la inko fluas al la pinto de l' plumo, la fontoplumo taŭgas por skribado. Plumo bonkvalita kun inko malbona, aŭ en mala okazo, la skribado ne plenumiĝas ideale. Inko kaj plumo estas interdependaj. La rilato de inko al plumo estas tiu de animo al korpo.

Ni personigu la fontoplumon. S-ro Fontoplumo estas sentaŭgulo per si mem. Ĉar ekzistas la homoj, kiuj ĝin uzas, ĝi fariĝas taŭgulo. En tiu okazo la homo



Sinjoro Hidemaru Deguci en Diservista kostumo.

estas animo kaj s-ro fontoplumo estas korpo. Ankaŭ en la homo troviĝas ambaŭ animo kaj korpo: la korpo estas disponebla de l' animo kaj la animo povas plenumi diversajn misiojn per la korpo, en la materia mondo. Kio rekte movigas la homan korpon estas la homa koro. Kiu agas sur la homan koron estas *gardospirito* (en tiu-ĉi okazo la homa koro estas korpo kaj gardospirito estas animo). Ankaŭ la gardospirito havas *sian* gardospiriton, kiu lasta ankoraŭ havas *sian* ktp. La unua estas korpo de l' dua, kiu tamen fariĝas korpo de l' tria ktp. Tiamaniere la rilato inter animo kaj korpo estas senfina.

Ni ekzamenu nur la homan korpon. La nerva sistemo estas animo kaj la vejna sistemo estas korpo. Tendeno estas animo kaj karno estas korpo. Ankaŭ en haŭto troviĝas dermo kaj epidermo. Eĉ unuopa haro konsistas el ambaŭ spirita kaj materia substancoj. Atomo konsistas el protono kaj elektronoj. La spirita-korpa rilato troviĝas ne nur inter objektoj spirita kaj materia, sed ankaŭ inter spirita objektoj mem, aŭ inter materiaj objektoj mem,

La homo estas vazo aŭ instrumento de l' gardospirito kaj li estas rajtigata uzi pure materiajn objektojn de la fizika mondo. Alivorte, la homo estas korpo rilate al la gardospirito, sed animo rilate al la materia mondo. Tiam interrilaton ni povas vidi ankaŭ en socia sistemo! Ekz. Gubernatoro estas korpo en rilato kun Ministro, tamen li estas animo rilate al Urbestro aŭ Vilaĝestro.

El la supra konstato estas evidente, ke animo estas ĉefa kaj korpo vica kaj la principo de *animo-super-korpismo* estas vera.

Sed en certa okazo tio renversiĝas kaj korpo-super-animo pravas. Ekz. la rilato inter granda korpo kaj spirito sub ĝia influo; la rilato inter socio kaj homo vivanta en ĝi. La homa spirito multe ricevas influojn de l' medio (korpa). Sed ĉar ĝi estas korpo eksterordinare granda, farita de iu grandioza spirita estaĵo, ĝi donas gravajn influojn al la spirito, kiu naskiĝis en ĝi. Alivorte en la supra okazo, animo nutriĝas kaj formiĝas de korpo. Tial estas memkompreneble, ke montoj, riveroj, landoj, socioj kaj medioj (kiuj estas kreitaj ne de ni mem, sed de pli superaj estaĵoj ol ni) ne estas disponeblaj de ni homoj.

Spirita kaj Materia Mondo

Sendube morto estas ĉagreninda evento en la homa mondo, sed se oni rigardas ĝin el la spirita mondo, ĝi estas ĝojinda afero, ĉar kiom da mortoj, tiom pli multnombriĝas la loĝantaro en la spirita mondo. Mi antaŭsupozas, ke kelkaj demandoj, ĉu ne plenstopiĝus iam la spirita mondo se la homoj ĉiutage enirus tien multope? Tiu demando devenas de l' nescio — ke la spirita mondo estas senfine vasta. La spirita mondo estas la mondo de senlima vasteco kaj grandeco. En la materia mondo tempo fluas laŭorde kaj spaco estas limigata, sed en la spirita mondo troviĝas nur vibra kontinueco de sentimentoj (en la spirita mondo tempo kaj spaco ne estas esencaj

elementoj kvankam ili ekzistas kiel impres-
aĵoj de nia «subjekto».) La kontinueco de
sentimentoj estas eterna kaj tial la spirita
mondo estas la mondo de senfineco kaj
senlimeco. Por tion kompreni ni konsideru
la homan cerbon. Ĝi estas space malgran-
da, limigita kaj laŭ fluo de l' tempo en-
ŝtopiĝas diversaj aferoj, sed oni povas en
ĝi konservadi kiom ajn abunde kaj ankaŭ
rememori senrigarde al la tempofluo. Dum
oni vivas en la kadro de l' materia mondo
oni devas vole-nevole sin submeti al la
kondiĉoj de tempo kaj spaco, sed kiam oni
eniras la spiritan mondon tra la pordo de
morto, oni ne plu bezonas submetiĝi, ĉar
tie, tempo kaj spaco submetiĝas al nia
«subjekto». Tial en la materia mondo estas
neble prikonsideri aferojn aparte de tempo
kaj spaco, sed en la spirita mondo oni nur
sentas tempon aŭ longa aŭ mallonga, spacon
aŭ vasta aŭ malvasta depende de siaj senti-
mentoj. En la fizika mondo tio, kio estas
samtempe kaj samloke kun ni, vidiĝas en
niaj okuloj, kaj kio sonas, aŭdiĝas en niaj
oreloj. Sed alimaniere en la spirita mondo:
nek aŭdiĝas tio, kio sonas ĉirkaŭ ni, nek
vidiĝas tio, kio troviĝas apud ni, *se tio ne
harmonias (korespondas, agordiĝas) kun sen-
timentmovo de nia koro.* Eĉ se individuaj
spiritoj kunestadus (eĉ se ili ŝajnus al nia
materia koncepto, ke ili interplektiĝos!)
kaj tamen se iliaj nocioj estas malsamaj, ili
vivas en apartaj regionoj de l' spirita mondo:
ili estas fore unu de l' alia. Ankaŭ la
koncepto de tempo en la spirita mondo
estas alia ol tiu de l' materia mondo.
Tempo fariĝas efektive mallonga al tiu,
kiu estas en ĝojega ekstazo (en la materia
mondo oni nur sentas ĝin *kvazaŭ* mallonga
en tia okazo-kaj forkuris tiom da tempo
kiom forpasis la horoj!). Kiam oni sen-
paciencege atendas ion, la impresiĝo de
tempo fariĝas efektive longa (kvankam en
la materia mondo, en tia okazo oni sentas
ĝin *kvazaŭ* longa malgraŭ efektiva forpaso
de tempo laŭ horloĝo!).

Konklude, la materia (aŭ fizika) mondo
estas la mondo, kiu submetiĝas al la kon-
diĉoj de tempo kaj spaco, kaj la spirita
mondo estas la mondo, kiu submetiĝas al

nocioj (aŭ sentimentmovoj). Tial en la
spirita mondo la distanco inter tiuj, kiuj
simpatias (aŭ amas) sin reciproke, subite
mallongiĝas kaj ili devas aŭ povas neevi-
teble kunvivadi en la sama regiono pro
komunaj sentoj kaj karakteroj. En la ma-
teria mondo estas malsame! Tiel longe,
ĝis kiam oni procedas per fizikaj rimedoj
super tempo kaj spaco, oni, eĉ geamantoj,
ne povas interalproksimiĝi, nek kunestadi
intimegaj amikoj, kiuj havas similajn karak-
terojn kaj komunajn sentojn. El tio sekvas,
ke la homan vivon ofte akompanas doloraj
sentoj, sed aliparte estas la avantaĝo, ke
la homo, vivante vole-nevole en nefavoraj
medioj kaj interkontaktiĝante kun malsim-
patiaj personoj, povas nutri, evoluigi kaj
poluri sian animon kiel tranĉilon per
akrig-ŝtono.

*

B kaj C troviĝas samloke, kaj A forestas.
Se A eksentas amon (aŭ malamon) al C,
ofte okazas, ke la sento de A komuniĝas
kun B, kaj B impulse amas (aŭ malamas)
C'n senscie. En tia okazo B estas *repre-
zentilo* de A. Kiam edzino kisas la infan-
on kun ama sopiro al sia forvojaĝinta
edzo, tiam la infano ludas la rolon de re-
rezentilo de l' edzo. Kiam oni ege
incitiĝas, oni ofte forĵetegas objekton. Tiu
objekto estas la reprezentilo de l' ofendinto.
La materia mondo estas la reprezentilo de
la spirita mondo. Tial en la japana ling-
vo oni nomas la materian mondon ankaŭ
reprezentita aŭ respuguliĝinta mondo. Kaj
la homo estas reprezentilo de l' spirito.
Kondiĉe nur, ke la homo konscias la re-
prezentilecon de l' spirito, li povas spirite
kaj anime nutriĝi, edukiĝi kaj kreski. Ju
pli intensa ligiteco troviĝas inter «la origi-
nalo kaj la reprezentilo», des pli bone, kaj
en mala okazo, male. Ekz. forĵetante ob-
jekton pro kolero, estas pli bone elekti
tion, kio havas plej grandan ligitecon (rila-
tecon) kun la ofendinto, incitinto... Jen
en nia lando estas ordinara kutimo, ke oni
kultas al portreto aŭ vestaĵo kiel reprezen-
tiloj, kaj ni plenumas *ĉinkon* (Di-metodon)
por resanigi malsanulojn pere de ili.

Trad. : T. Nakamura

JAPANUJO

(EL «VOJAĜLIBRO» DE FILOZOFO) (7)

— Grafo H. Keyserling —

KIOTO (3)

Mi ne plu rekonas min mem: ne nur ĉar mi dediĉas horojn maldiligentante en antikvaĵejoj kaj vendejoj de kuriozaĵoj — mi eĉ efektive aĉetadas kaj pripensadas internajn dekoraciojn. Tio ĉi estas tute neordinara aferstato. Neniam, laŭ mia memorkapablo, mi atribuis iun gravecon speciale al la posedo de objektoj kiuj plezurigas miajn okulojn. Estas verdire konforme al miaj personaj bezonoj kiam tio kio estas bela estas tie kie mi povas, sed kie mi ne devas, vidi ĝin, en la hejmoj de amikoj aŭ en publikaj kolektoj; se ĝi estas konstante antaŭ mi, ĝi ĝenas min, kaj ju pli multe des pli granda estas ĝia propra merito. Tiukaze mi devas konsideri ĝin, alkonformigi la stilon de mia vivo al iu artobjekto; super ĉio, mia imago ne estas libera en tia ĉeesto. Kiel mi elpremu pensojn senĝene el senkonsciaj profundegoj, se la spaco antaŭ mi ne estas malplena, se miaj sensoj estas kaptataj denove kaj denove per io perfekta ekster mi mem? Estas vere, ke aĵoj kiuj estas nur plaĉaj ne estas tiel limigaj en sia efiko; sed tiukaze, mi ne bezonas ilin. Kompreneble, mi malŝatus se la sinjorinoj, kiujn mi konas, ne aranĝus sian ĉirkaŭaĵon tiel bele kiel eble, ĉar kiam mi estas kun ili, mia konscio estas direktata al eksteraĵoj, kaj suferas pro iliaj nesufiĉecoj; de mia propra ĉirkaŭaĵo mi nur postulas ke ili tute ne enpaŝu mian konscion: tio estu ĝia perfekteco. Sed tie ĉi, sub la influo de Japanujo, mi fariĝas epikurano, amatoro de artoj. Tie ĉi, ĉio videbla estas planita por la homoj: la tuto de l' Naturo ŝajnas esti nur kiel la kadroj de l' homa vivo, ĉiu objekto estas tie ĉi por la uzo, ĉiu artobjekto antaŭsupozas observanton. Tiel okazas ke eĉ homo

aliokaze sendependa de l' ekstera mondo sentas premon kaj malkomforton, se li estas entute impresebla, tiel ke ĉiu malharmonio en Kioto pensigas min senvole, kio mi povus esti en harmonio estetika kun mia ĉirkaŭaĵo, kaj mi vivas, verdire, en la kredo, ke mi daŭrigos senti tiajn mankojn hejme. Mi devas ridi pri mi mem. Kun iom malpli da mem-kritiko mi povus preskaŭ persvadi min ke mi estas art-konanto. Hodiaŭ matene, ĉe la malfermo de aŭkcio, mi observis kiamaniere japanaj ekspertoj ekzamenas porcelanaĵojn. Mi estas verŝajne blinda rilate al iliaj observoj, sed ŝajnis al mi en tiu momento, tute serioze, kvazaŭ mi ankaŭ povus partopreni la konversacion pri porcelano, kaj verdire ŝajnas ke mi ne estus juĝinta malĝuste en granda nombro da okazoj. Tion ĉi mi ŝuldas entute al la influo de mia ĉirkaŭaĵo; laŭnature mankas al mi ĉiu sento pri artoj kaj metioj. Tamen, mi estas tute kontenta ke mi staris en la ŝuoj de bongustulo, dum kelkaj momentoj ĉiukaze, ĉar en la procedo nova flanko de l' japana temperamento evidentiĝis al mi. Goethe rimarkas ie ke la teatro posedas la duopan specialecon ke ĝi imagigas al la spektantaro ke ĝi ankaŭ estas kapabla produkti dramajn verkojn. Kio estas la kaŭzo de tio ĉi? Ŝajne la fakto ke homoj ne atentis tiel precize la plejparton da okazaĵoj ol la prezenton de iu teatraĵo; kaj tio kio vere okazis kuŝas, rigardate desub la angulo de l' menso, sur la sama nivelo kiel tio kio estas imagita. Tial, la spektanto nevole pensas ke li mem kreis la dramon de iu alia homo, sed ĉar tio evidente ne estas la fakto, li imagas ke li estas kapabla fari similan verkon. Laŭ tute sama maniero, eĉ barbaro en



En japana danco ekvilibro kaj gracieco de movo estas pli grava ol agado. Ventumilo, aŭ kelkfoje viŝtuko, estas nepre necesa por dancistino por esprimi sian emocion.

aristokrata ĉirkaŭaĵo, iufoje konkludas ke li «vere» estas art-konanto, ĉar en tiuj ĉi cirkonstancoj li rimarkas tion kion aliookaze li ne kapablas vidi. Tiu ĉi penso-procedo, tamen, ne ankoraŭ venis al sia fino: la edukado al la atentkapablo por la celo de observado pri certaj aferoj evoluigas la kapablecon vidi ilin; fakte, ĝi kondukas pli foren: daŭra atento elvokas kreajn talentojn. Ĉi tio do ŝajnas al mi esti la ŝlosilo al la kompreno pri la arta kreemo de Japanujo. La japanoj estas laŭnature ne produktivaj laŭ la antikva ĉina maniero; sed ili fine fariĝis kreemaj ĉar principe, imago kaj tekniko, ricevkapablo kaj produkto apartenas al unu sola psika tuto.

Potenca imago kreas esprimrimedojn por si mem; kie tekniko estas perfekta, tie spirito kaj signifo enkarniĝas tute nature; la perfekta observado estas finfine surprizita de originalaj ideoj. La japanoj posedas du kvalitojn ekde sia naskiĝo: ili estas nekompareble akraj observantoj kaj virtuloj en ĉiu teknika arto. Per la virto de tiuj ĉi kvalitoj ili ne nur povis proprigi al

si la rezultatojn de ĉiuj popoloj, kiujn ili deziris imiti — ili sukcesis, verdire ne havante ideojn, prezenti ideojn, eĉ ideojn kiajn neniu antaŭ ili elpensis.

* * *

Antaŭ ol mi vidis japanan danc-prezentadon, mi neniam pensis, ke ritmoj tiel perfektaj kiel bizantaj mozaikoj povas esti prezentataj de vivantaj estaĵoj. La liutludantoj dekstre, la tamburistoj maldekstre, sidantaj en la sama pozo, limigas la amfiteatron. Ili faras la samajn movojn en la samaj tempoj, kaj kune formas vivantan frison de perfekta ritma unueco. Kaj la geŝoj, kiuj prezentis karakter-dancojn ĉu sur la scenejo, ĉu flanke de l' spektejo, produktas efektojn de anĝeloj, sur mezepokaj bildoj pri la paradizo, de nuraj ripetoj de eterne konstanta simbolo. Ĉe tiu ĉi okazo mi sentis pli ol iam: la naturo iĝas vere si-mem nur en ritma stilizo; la riĉeco de l' vivo estas nur plenumata en la simpliga kurbo. Mi sentis min kvazaŭ mi estus larĝigata, kvazaŭ ĉiuj malhelpoj kaj baroj estus malaperantaj; estis kvazaŭ ĉiuj impulsoj finiĝus en serena harmonio. La akompananta muziko ne sonis bele al eŭropaj oreloj, sed la prezento mem estis muziko. Tie ĉi mi konstatis por la unua fojo, ke moviĝantaj koloroj kaj linioj povas efektive tute same kiel vibrado de sonoj. La eŭropa baleto estas tro supraĵa por kaŭzi tiajn efektojn; la faca aktado de niaj muzikaj dancistoj egalvaloras al kopiado aŭ interpretado, ĝi ne estas senpera esprimo. Principe tio, kion Jacques-Dalcroze klopodas realigi devus esti ideala, sed mi timas, ke ĝi estas malperfekte tia, ĉar niaj dancistoj, sendepende de sia ekzerciteco, restas memkonsciaj individuoj; eŭropano ne povas forgesi, ke ĝi estas «personeco». En Japanujo la idealo estas vere atingita, ĉar la aktoroj estas *geŝoj**; kreaĵoj naskitaj kaj dresitaj por produkti feliĉajn atmosferojn sen memkonscieco; reprezentante arabeskon aŭ akompanon senpersone; neniam ekzisti por kaj per si mem. Tiu, kiu rigardas ilin, neniel pensus, ke ili posedas individuan

* *ge(j)ŝo* estas japana kantistino.

animon. Ili estas, kion ili reprezentas — sonoj frapitaj sur kordo, kolormakuloj, mozaikoj; elementoj sen propra signifo. Benita estas la popolo, kiu tiel honorigis la geŝojn! Anstataŭ forpeli ilin malestime, aŭ utiligi ilin nur kiel ĝu-rimedon, ĝi konsekris ilin kiel pastrinojn: konsekvence, kio povus esti la plej malalta en si mem partoprenas en la kreado de la plej alta. La geŝoj havas la privilegion kaj la devon gardadi la malnovajn, tradiciajn formojn; ili do estas gardantinoj de l' Plej Sankta. Konstante prezentante la ceremoniojn kaj dancojn, kiuj estas la perfekta esprimo de l' animo de antikva Japanujo, ili konservas tiun ĉi animon vivantan tra ĉiuj tempoj. Kaj nur ili, la facil-kaj malpez-koraj, kapablas tion fari. Neniu krom tiu ĉi tipo de homoj kapablas esti elementa laŭ la postulata maniero de ritmo kaj ceremonio, ĉar nur tiu ĉi tipo estas, metafizike rigardate, sen-mema; nur geŝoj vivas relative laŭ la strikta senco de l' vorto, nur ili estas vere senpersonecaj. Tial ili povas atingi tion, kion pli aŭtonomaj tipoj ne povas: ili povas perfekte reprezenti, kio en figura esprimo estas super personeco.

Te-ceremonio okazis antaŭ la danc-prezentado. Estis mirinda sperto por mi observi kian profundan komprenon simplaj homoj atingis en kompleksa ceremoniaro. Dum tiu ĉi formosento vivos, Japanujo ne perdos sian animon. Sed kio okazos, se, eĉ en tiu ĉi sfero, ĝi sekvos la ekzemplon de l' Okcidento? En Eŭropo eĉ la Papo jam ne komprenas la profundan signifon de l' formo, eĉ ne menciante reĝojn kaj princojn; la brita nacio sola montras indan escepton ĝis la nuna tago.

... ..

Ilia perfekta prudento kondukis al la samaj rezultatoj kiel artista intuicio en aliaj kazoj: ili scias ke formo ne nur simple prezentas enhavon, sed vere kreas ĝin, kaj ĝi tradukas tiun ĉi ekkonon praktike des pli energie, ju pli la enhavo en si mem

perdas el sia valoro. Hodiaŭ, kiam neniu vere kredas plu la dian rajton de l' reĝoj, ilia origina prestiĝo esprimiĝas des pli potence en eksterajoj, ĉar la apero reagas sur la koron. Ju pli la ligoj inter la diversaj partoj de iu imperio malligiĝas, des pli ĉiu parto individuigiĝas, des pli la registaro gravigas la simbolojn. Tial, la reĝo, verdire nur unu el la ceteraj oficistoj, kies potenco estas multe sub tiu de siaj ministroj, estas ĉirkaŭata, kiam ajn seriozaj aferoj estas decidataj, de ŝajna majesteco, kiun la ŝaho Dsehan povus envii al li.

Tiaj rimedoj, nature, ne plu estas efikaj ĉie. Angloj permesas ke la formoj kreu en ili tion kion germanoj, ekzemple, ne permesas. Tio ĉi ne signifas ke la germanoj posedas pli grandan liberecon, sed ke la angloj posedas pli grandan kulturon. Kie ajn la interna flanko de l' vivo estas koncernata, estas la signifo kiu kreas la faktojn; en la signifo atribuita al iu formo, nova kaj pli alta sfero de realeco estas malkaŝata, kaj tiu ĉi formo vekas konscieco eĉ en la animoj de tiuj kiuj neniam estis perceptintaj ĝin solaj. Tiu ĉi vereco estas tamen tute evidenta por la japanoj: ĉu ĉiam estos same? Mi timas la plej malbonan, ĉar ili ne komprenas ĝin; ili agas laŭ ĝi ne sciante kion ili faras. Tuj kiam ili ekzamenos la signifon, kio devas okazi pli aŭ malpli frue, ŝajnas esti certe ke ili trovos malĝustan respondon; ili apenaŭ akceptos, kiel pozitivistoj, tion kio ne estas rekte komprenata de ilia racio, kaj ili komprenos la sencon de simbola vero multe pli malfacile ol ni, kiuj estas tiom multe pli talentaj mistike.

... ..

Revenante al la institucio de la geŝoj (ili ja estas institucio: ilia majstreco pri etiketo estas patentigita, kaj la sistemo ricevis Imperian sankcion): niaj sociaj reformistoj estas konsternitaj, ke tia institucio ankoraŭ ekzistas; se la geŝoj vere ne estas personecoj, ili pensas, ke oni devus

“Tango no Sekku” aŭ Festo de la Knaboj

— Jozefo Major —

En la marta numero de O.I. mi klarigis pri «Hina-Maturi» aŭ Pufesto, kiu estas verdire la festo de l' knabinoj kaj kiu okazas en Japanujo ĉiujare, la 3an de l' tria monato (marto).

En tiu ĉi artikoleto mi volas doni mallongan klarigon pri *Tango no Sekku* aŭ Festo de l' Karpo, kiu estas la festo de l' knaboj kaj kiu okazas en Japanujo ĉiujare, la 5an de l' kvina monato (majo). En ĉiu japana domo, kiu havas knabon, oni aranĝas ekspozicion de *samrajo*-pupoj kaj diversaj aliaj, kiuj formas tradiciajn militilojn, ktp. Foje oni elmontras ankaŭ verajn kaskon kaj kirason. Same kiel en la okazo de la knabina pufesto, ili estas elmontrataj

sur bretoj, kiuj formas ŝtuparon. Plej supre sidas samrajo-pupo kirasita kaj sur la sekvaj bretoj troviĝas, ekzemple, glavoj, pafarko, sagoj, kasko, kiraso, tamburo, ĉevalo, ktp. Ĉiuj estas tre arte aranĝitaj. Krom tiu endoma dekoracio, tiu ĉi knaba festo estas la plej karakteriza el ĉiuj, ĉar ĝiaj eksteraj manifestiĝoj estas okulfrapaj: sagoj kun pafarko, gigantaj paper-fiŝoj (karpo) kun standardoj flirtantaj alte super tegmentoj...

Ĝenerale parolante, japanaj gepatroj estas treege modestaj pri siaj infanoj. Sub la efiko de ĉina etiketo patro eĉ skribas (en leteroj al aliaj) sian filon «porko». Tio ne signifas tamen mankon de afekcio. Kaŝitaj

eduki ilin, ke ili fariĝu tiaj; estas dirate, ke estas malinde al homoj esti nur elementoj. Ĉielo! La plej multaj homoj estas nuraj elementoj, kaj nur povas atingi sian perfektecon kiel tiaj, speciale kiam ili havas geŝo-naturon. Mi ne volas prezenti la malnovan japanan socion kiel idealan, sed tamen estas vere, ke ĝia principo, en la donitaj empiriaj cirkonstancoj, ebligas mem-realigon al la elementoj laŭ multe pli alta grado ol nia socio. Kaj mi ne pensas tie ĉi nur pri publikulinoj; kiuj en Eŭropo, pro nia abomeninda sistemo, aperas tiom pli malnoblitaj ol ili aperas an Japanujo: mi pensas pri ĉiuj sociaj klasoj. Nia idealo estas la perfekteco de la individuo; ĝi estas eble la plej alta. Sed estas alia demando, kiu metodo estas la plej konvena por la atingo de tiu ĉi perfekteco. La plej multaj homoj, eĉ en Okcidento, ne estas sufiĉe individuigitaj por fariĝi perfektaj sekvante siajn proprajn impulsojn (tiu ĉi ankaŭ validas por la Italujo de l' Renesanca periodo). Kaj ĉar la moderna epokspirito jam ne favoras la klopodon por la perfekteco de tipoj, la individuoj fariĝas pli sendepen-

daj, sed sammaniere malpli distingitaj ol antaŭe. Tion ĉi oni vidas plej bone en la okazo de la virino. Laŭ sia naturo, estas pli malfacile al ŝi ol al la viro sekvi sian perfektecon en kaj per si mem; la plej grandaj virinoj, kiuj vivis, fariĝis tiaj, kiaj ili estis pere de sindono — al viro, al Dio, al idealo. Kaj nun eĉ la plej malgrandaj volas esti «tute si-mem». Tiuj stultaj estaĵoj ne komprenas, ke ili fariĝus si mem laŭ pli alta grado se ili fiere konfesus la tipon al kiu ili apartenas kaj serĉus sian perfektecon en ĝi. Ĉar tiu ĉi formo, markita per la saĝeco de ambaŭ historio kaj naturo, helpus ilian individuecon al pli forta realigo ol la persona idealo, kiun oni ĝenerale nur malekzakte reprezentas al si kaj nur malofte alcelas kun sufiĉa firmeco. Sur kia multe pli malalta nivelo estas la plej modernaj virinoj, ol tiuj apartenantaj al estinto, kiu ne estas malproksima! La plej alta tipo de l' nuna eŭropanino estas enkorpigita en la naskita francino. Ĉar ŝi sola estas ankoraŭ edukita tiel, ke ŝi reprezentu ĝis reprezentanto fariĝas realeco.

(*Dairigota*)

sentoj estas despli pasiaj! Mi memoras subite malnovan bildon kiun mi vidis en iu japana palaco: malsana filo kuŝanta en ĉambro kaj en la apuda ĉambro la patro ŝtelrigardas tra fendo en la paper-pordo... La intensa timo kiu esprimiĝas sur la mieno de tiu viro estas nepriskribebla: ĝi montras la forton de l' amo al infano, kiu forto estas kutime kaŝita antaŭ la mondo.

Sed okaze de la Knaba Festo la baroj estas subite renversitaj kaj aperas la tuta fiero pri filoj. Ĉar filoj estas daŭrigantoj de l' familio, institucio treege gravigata en Japanujo. Flagoj estas hisataj super la tegmentojn kaj tie ili flirtantaj en la printempa vento anoncas kiom da filoj havas la koncerna domo. Unu flago por ĉiu filo.

Kaj kiu vidis pli kuriozan aĵon ol japana paper-karpo naĝanta en la blua aero? Rigardu, kiel la vento pufigas ĝian dikan

ventron: nigraj kaj ruĝaj makuloj sur blanka fono, majstroverko de l' simpleco. Kial oni uzas tian simbolon? Ĉar karmo estas kuraĝa fiŝo; ĝi naĝas kontraŭ la fluo kaj eĉ supren — baraktas akvofalon. Tiel knabo devas esti kuraĝa kaj persistema en la vivo.

Ankaŭ tiun ĉi jaron la Knaba Festo havos pompon kaj gravecon. Por la festo de la Knabo-Tronheredanto giganta karmo flirtos super la Imperia Palaco en Tokio, la 5an de majo. Ĉirkaŭ ĝi flirtos multaj dekmiloj da plu modestaj karmoj, ĉie kie estas knaboj: junaj heredantoj de multaj, modestaj familoj. Kaj tiu maro da flirtantaj karmoj kaj flagoj reprezentos la novan generacion de Nipponlando al kiu ĉeniĝas tiom da espero kaj kiu devas solvi tiom da problemoj, de ni kulpe forŝovataj al tempoj estontaj!



En la tago de la «Knaba Festo»:
La karmoj flirtas alte en maja lazuro.
Japana knabo bone servata sidas
antaŭ la endoma dekoracio.



Pri la Fundamenteco de Esperanto

(Responde al Sro J. Eliot)

— E. Rodriguez Ontoria, Buenos Aires —

Rilate la suprecititan artikolon (aperintan en O.I. dec. 1934), mi volas, samideane kaj bonvole, esprimi kelkajn rimarkojn, kiuj, se ili ne estus trafaj, almenaŭ estas sinceraj.

1). La numeraloj ne estas deklinaciataj; sed, kiam la vorto «unu» estas uzata kiel substantivo, kiel en la ekzemplo donita de s-ro Eliot (se mi ne eraras, ĉar, flanke parolante, mi trovas la tutan paragrafon iom neklara), tiam la vorto «unu» devas esti deklinaciata kiel substantivo, kiu ĝi estas. Tiurilate mi legis kelkloke ion de Zamenhof; ĝi estas tute logika.

2). Mi ne vidas ian malutilon, nek eĉ malkorektaĵon, se mi diras speciale al komencanto aŭ varboto, ke «*La*» estas simila al «*The*», konsiderante la fakton ke la angla lingvo estas tiel vaste studata kaj konata, kaj kvazaŭ la konkuranto de Esperanto.

Kvankam mi komprenas la intencon de la verkinto, kaj mi ne kontraŭstaras la frazon: «Antono estas la malplej saĝa el la fratoj», mi kredas ke la frazo «Antono estas la malplej saĝa el ĉiuj siaj fratoj» estas ankaŭ korekta kaj pli *klara*.

«Siaj» rilatas al Antono, kiu estas la subjekto de la frazo kaj sekve, estas korekta. Ni plue konsideru ke Zamenhof, kompreneble, prilaboris la ekzercaron kun la intenco montri la uzadon de la vortoj, kaj pro tio li uzis kiel eble plej multe da vortoj por montri *klare* la sencon de la frazo kaj de ĉiu aparta vorto.

Plue, tuŝante la komparon de *La* kaj *The*, mi kredas ke se ni diras angle: «Anthony is the least wise of the brothers» kaj «Anthony is the least wise of all his brothers», ni havas ekzakte la saman diferencon inter la du frazoj esperanta kaj angla. Ambaŭ estas korektaj. Estas nur

afero de gusto.

3). «Mi iras de loko al loko». «Mi iris de la lernejo al la preĝejo». «De tempo al tempo, mi vizitas ŝin». Mi volus scii kiel oni povus konstrui tiujn frazojn sen la prepozicio «de».

Mi kunsentas kun la verkinto ke tiu prepozicio estas jam rezervita por esprimi la genitivon kaj la kvazaŭ-genitivon ĉe la pasivo, sed tiuokaze oni bezonus alian novan prepozicion por esprimi la direkton kontraŭa al «al»: «mi iras al ... «mi venas ... ĉu ne «de»? Se ne estas «de», do bonvolu doni al mi alian, anstataŭan prepozicion.

Se ekzemple ni volus traduki la jenan anglan frazon: «I come from my uncle's, where I found the book of my father which is written by NN.» Ni devus traduki jene aŭ simile: «Mi venas de mia onklo, kie mi trovis la libron de mia patro, kiu estas verkita de NN.» Ni havas tri-foje la prepozicion «de» kun tri malsamaj signifoj.

Nu, resume, mi ne scias, ĉu s-ro J. Eliot estas serioze kaj profunde pripensinta la tutan aferon kaj, kion li postulas de ni, «simplanimaj» idealistoj. Ĉar se la aŭtoro de Esperanto mem (flankenlasante la fakton ke li estas la kreinto de la lingvo), post kelkdekjaroj da verkado kaj ekzercado, ne skribis laŭfundamente!! Granda Dio! Kiu skribos laŭfundamente? Kiom da tempo oni bezonos por akiri sufiĉan konon por esti preta skribi laŭfundamente? Ne terurigu nin ...!

Mi pensas ke estas iomete da subtileco, aŭ pli ĝuste, tro da ĝi, flanke de (aŭ ĉe-flanke, kiel estos pli plaĉa al vi) s-ro Eliot. Se ni sekvus tiun vojon, estus necese por skribi frazeton en Esperanto, pripensadi dum kelkaj horoj antaŭ ol kuraĝi preni la

(al p. 25)

Paĝo de Spiritismo

PROMESO AL SPIRITO

— *Ŝoiĉiro Usugi* —

«Dio ekzistas?! Se jes, tion pruvu. Oni venenas la socion per arbitraj instruoj, kiujn oni faris sub la hipotezo, ke Dio ekzistas. Dio kreis ĉion en la universo kaj ĝin administras, diras religiistoj. Do, kiel oni povus solvi la Darvinismon? Miraklo?! Mistika laboro de la Ĉiopovulo?! Ĉu la modernuloj povus saviĝi per tiaj romantikaj ideoj aŭ instruoj? Nenie troviĝas vera savo, sen certa koncepto pri la ekzisto de Dio. Kio estas ekstazo en dikredo? Kio estas la savo? Kaj kio estas trankvilo de la animo? Kvankam oni gravigas la animon aŭ la koron, ĝi ekzistas nur premisante la ekziston de la korpo; kaj pereado de la korpo estas samtempe pereado de la animo»

Tio ĉi estas la religia koncepto de plejparto el la inteligentuloj, kiuj estas venenitaj de la scienco. Senescepte ankaŭ mi estis unu el ili. Kaj tamen mi, kiu ĝis antaŭ tri jaroj tute neadis kun rikano la ekziston de spirito, nun serioze skribas ĉi tiun artikolon pri spirita fenomeno. Estas tamen kompreneble, ke kuŝas forta motivo rilate al tia grandega ŝanĝiĝo de miaj ideoj, pri kiu mi mem miras. Jene mi rakontos al legantoj pri la «promeso al spirito» kiun mi spertis lastatempe.

* * *

Estis en unu nokto de la mezo de la lasta oktobro. Mi enlitiĝis frue, ĉirkaŭ la 7a vespere, ĉar en tiu tempo mi estis mal-sanema. En la lito mi legis gazeton por forigi solecon; post ĉirkaŭ duonhoro mi jam enuis en la legado kaj iam kaj iam la konscio nebuliĝis pro dormemo. Tia duon-dormado daŭris ĉirkaŭ dek minutojn, mi pensas. Subite mi eksentis, ke iu eniris la ĉambron. Direktante la rigardon al

la enirejo, mi trovis virinon tridek-kelk-jaran senforte starantan en la ĉambro.

Mi fiksis la rigardon kaj rimarkis, ke tiu virino estas s-ino Ocuta, la edzino de s-ro Ĵukiĉi Kuno, kiu loĝas najbare de mia domo. Sed ŝi mortis pro malsano antaŭ kelkaj monatoj kaj tial ŝi ne povas esti surterano. Tiu ĉi devas esti ŝia spirito! Timeme mi fiksis la rigardon al ŝia stranga figuro. S-ino Ocuta eksidis tie tute senvive kiel ombro kaj diris:

«Mi aŭdis, ke vi estas malsana. Ĉu vi jam bonfartas?»

Kiel malforta kaj malĝojtona estas ŝia voĉo! Kaj la vizaĝo estas tute pala, kiel tiu de kadavro. Mi tremetis pro timo, sed ŝajnigante min aplomba, mi respondis:

«Dankon, mi preskaŭ resaniĝis. Nu, kun kia afero vi venis al mi?»

Nun respondis iu, alia ol s-ino Ocuta, kun raŭka voĉo de maljunulo.

«Kun peto mi vin vizitis . . .»

Denove mirigita, mi serĉis la voĉon per la rigardo kaj trovis nebulan figuron rond-forman, sidantan meze de la ĉambro. Kiu ĝi estas? Mi enrigardis en la vizaĝon, sed strange, ĝi ne havis la vizaĝon; ne, eble ĝi havus, sed al mi ne vidiĝis. Kaj tamen baldaŭ mi sentis, ke ĝi estas la patrino de s-ino Ocuta. Por certigi la nomon mi demandis:

«Kiu vi estas?»

«Mi estas la patrino de tiu ĉi Ocuta.»

La nebula spirito respondis pli klare kaj pli vive ol s-ino Ocuta. Ŝi parolis al mi tute ne atenditan aferon:

«Ni havas gravan aferon, kiun ni petegas al vi tutkore. Kiel vi bone scias, ĉi tiu mia filino antaŭ nelonge mortis kun granda ĉagreno, postlasante siajn kvar infanojn en la reala mondo, kiuj ĉiuj estas ankoraŭ

malgrandaj, precipe, la plej juna estas suĉinfano. Sed malgraŭ tio, ŝia edzo ĵukiĉi lastatempe»

La voĉo de la spirito, al mi ŝajnis, tremetas pro kolero. Ĝi daŭrigis ankoraŭ rakonti :

«Lastatempe ĵukiĉi amas alian virinon, forgesinte siajn mortintan edzinon kaj kompatindajn infanojn okupiĝas nur pri tiu amatino. Tio jam okazis kiam pasis apenaŭ du tri monatoj de la morto de lia edzino. Tre senmorala kaj riproĉinda estas lia konduto, ĉu ne? Mi profunde kompatas la mortintan Ocuta.»

Tiu ĉi spirito ŝajne estis tre pasia kaj la voĉo parolanta ŝanĝiĝis en ploron. La rakonto de la spirito de la patrino estas por mi surpriziga afero, pri kiu mi sciiĝis por la unua fojo.

Ĉi-foje la spirito de s-in Ocuta, ĝis tiam silenta, anstataŭis la patrinon kaj parolis :

«Mi ne estas ĵaluzema, nek volas diri neefektivigeblan aferon. Sed se la edzo faras tro kaprican kaj min ignorantan agon, mi ne povas esti trankvila, eĉ mortinte. Mi ne estas tiel malgrandanima, ke mi deziras, ke li edziĝu kun neniuj post mia morto; kontraŭe, mi ja deziras, ke li akceptu duan edzinon eĉ unu tagon pli frue, ĉar mi bone scias, ke en la nuna stato la hejmo ne iras en bona ordo. Mi multe ĉagreniĝas pro lia senprudenta agado: li havas amatinon jam en tiel mallonga tempo post mia morto, dum kiu eĉ ne sekiĝis la tero kovranta mian tombon, kaj pro ŝi li ne zorgas pri la infanoj kaj hejmaj aferoj, kaj la vilaĝanoj rikanas lin. Se lia ago daŭrus, pro granda ĉagreno mi devus vagadi en infero por ĉiam. Vi bone komprenis mian suferon, ĉu ne?»

La voĉo de la spirito de s-ino Ocuta estis malsekeca kaj korŝira tono, sed havis strangan forton, kiu frapis mian koron, kaj mi, iam kaj iam ensorĉita de ŝia parolo, profunde balancis jese la kapon ĉe la lasta parto. Denove daŭrigis s-ino Ocuta :

«Tre humile mi petas al vi, sinjoro, ke

vi bonvolu klopodi por ke, li akceptu la amatinon kiel laŭleĝan edzinon, se ne, distranĉu la interrilaton kun ŝi, ĉiuokaze por ke, li elektu unu el la du rimedoj. Volante tion peti al vi, mi vizitis vin kun la patrino. Ĉu vi bonvolus plenumi mian peton, sinjoro?»

Tion dirinte ŝi sin klinis al mi senforte kaj ĝentile. Konjektante ŝian kordoloron, mi ankaŭ fariĝis tre malgaja kaj respondis :

«Mi bone komprenis la tutan aferon. Mi penas laŭpove por ke vi povu esti trankvila pri la afero.»

Ne nur s-ino Ocuta, sed ankaŭ la patrino tre ĝojis kaj kelkafoje ili dankis al mi, klinante la kapon.

«Ni jam adiaŭos vin, denove petante vian bonarangon.»

Kun tiuj vortoj iliaj figuroj formalaperis kiel fumo. Ĉe tiu momento mi sentis intensan malvarmecon sur la dorso, kvazaŭ oni verŝus akvon sur min, kaj salte mi leviĝis de la lito.

* * *

La morgaŭan tagon mia konata junulo nomata M. min vizitis por demandi pri mia sano. Al li mi demandis :

«Ĉu vi aŭdas ian famon pri s-ro ĵukiĉi Kuno?»

«Veron diras la proverbô: *sub lumturo estas mallume.*»

Dirante tion, kun rideto li parolis min pri la famo de s-ro ĵukiĉi en la vilaĝo, kiu tute koincidis kun la rakonto de la spiritoj. Kaj precipe mi surpriziĝis ekscitante, ke la amatino de s-ro ĵukiĉi estas unu el miaj parencoj.

Longan tempon mi forestis el la vilaĝo, kaj sekve mi estis fremda pri cirkonstancoj de la najbaroj; tial mi ne sciis, ĉu la patrino de s-ino Ocuta ankoraŭ vivas, aŭ jam mortis. Sed poste sciiĝinte, ke ŝi ankoraŭ vivas, mi konvinkiĝis, ke la spirito min vizitinta estas de la vivanta homo.

Pasis kelkaj tagoj. Kaj kiam mi vizitis

s-ron Masago (Oomoto-propagandisto en la najbara vilaĝo), mi parolis al li detale pri la afero komisiita de la spiritoj. Li konsilis min kiel sekvas:

«Se vi akceptis la peton de la spiritoj, vi devas rapidi por solvi la aferon. Se ne, la spiritoj havos malamon kontraŭ vi.»

Mi do decidis en la koro, ke mi kuraĝos transdiri al s-ro Ĵukiĉi la deziron de la spirito de lia mortinta edzino kaj se eble, mi klopodos por ke, li edziĝu kun la amatino.

Sed tamen, efektive estis por mi iel malfacile malkaŝi al li la aferon. Cetere li estis tia, kiu ne havas religikredon, nek sciön pri spirito; estus senhelpe, se li min miskomprenus. Tion pensante mi estis hezitema. Eble iam min favoros bona ŝanco. Estas nebezone tiel rapidi. Tiamaniere, senfare mi pasigis tagojn kaj baldaŭ mi tute forgesis la aferon.

Estis en la vespero de la 22a de la lasta decembro. Post la vespermanĝo mi vizitis iun kaj ĉ. la deka revenis ĝis preskaŭ antaŭ la enirejo de mia domo. Jen tie, tute subite, en la mallumo ekbrilis ia pala lumo. Apenaŭ mi tion ekvidis, mi sentis neesprimeblan akran impulson kaj kun ek-krio mi falis teren senkonscia.

* * *

En la sekvinta frumateno mi reakiris la konscion en la lito, ĉe kiu la familianoj maltrankvile okupiĝis en la zorgado pri mi. Ili

diris ke en tiu komata stato mi diris denove kaj denove: «jen venas s-ino Ocuta!» De tiam mi estis atakata de gorga kataro kaj devis suferi en la lito. Tio, kio forte frapis mian koron ĉe la rekonsciigo, estis la rememoro pri la promeso al la spirito de s-ino Ocuta. Mi ne povas kuŝadi, ignorante la promeson, mi pensis. Senprokraste mi skribis leteron al s-ro Masago, de kiu mi ricevis konsilon antaŭe. De li venis tuja respondo, kiu diris, ke mi senhezite admonu s-ron Ĵukiĉi pri la afero, kiun mi estis petita de la spirito de lia mortinta edzino. Mi do tuj venigis s-ron Ĵukiĉi en la malsanĉambron. Mi senkaŝe peris al li la deziron de s-ino Ocuta kaj per mia tuta scio klarigis al li la staton de la spirita mondo kaj la postmortan vivon de la homo. S-ro Ĵukiĉi tre atente aŭskultis min de la komenco ĝis la fino. Li diris ripete kaj kun granda emocio:

«Mi bone komprenis vin. Mi tre dankas por via granda amikeco...»

Kaj li tuj konsentis al mia propono, ke post mia resaniĝo mi klopodos aranĝi tiel, ke li povos edziĝi kun sia amatino. Li foriris hejmen kun sereneco sur la vizaĝo. Estis ja granda miro por mi, ke la morgaŭan tagon min tute forlasis la kataro de l' gorgo, kiu ĉiutage min turmentadis per tiel intensa tusado. Poste mi sciigis, ke s-ino Ocuta mortis pro la sama kataro.

Trad. K. Osaki

Homa Vivo

Vivo kun Di-kredo estas vivo, en kiu malamo kontraŭ aliaj neniam havas lokon.

Vivo sen Di-kredo estas vivo, en kiu sinekzameno neniam okazas.

Tiu, kiu ne scias sinekzameni, certe brulmortigos sian tutan vivon, ĉiam malamante aliajn.

El «Amiko de najbaro»



VOLONTE AKCEPTATA

estas la kunlaborado de ĉiuj Esperantistoj!

Sendu publikigindajn artikolojn, konformajn al la spirito de la Organo Homaranisma,

OOMOTO INTERNACIA.

Japanana lingvo por Esperantistoj

«La japana lingvo — kun sia kurioza gramatiko, malcerta origino, antikva literaturo — estas lingvo inda al pli da atento ol ĝi ricevis ĝis nun.»

Prof. B. H. Chamberlain.

(32)

La Adverbo

Laŭ la Plena Vortaro *adverbo* estas «nevariebla vorto esprimanta lokon, tempon aŭ manieron: tie, neniam, tiel, ankaŭ, varme, sencele.»

Oni vidas *ĉi-sube*, ke la japana adverbo ne *ĉiel* korespondas al la supra difino, *kiel ĝenerale* gramatikaj terminoj okcidentaj nur *malperfekte* estas aplikeblaj al gramatikaĵoj orientaj.

En la japana lingvo ekzistas tri grandaj speco-grupoj de adverboj, kiujn ni klarigos en la sekvaj alineoj, sub I, II kaj III:

I. Veraj Adverboj

«Veraj adverboj» estas nomataj tiuj vortoj, kiuj estas ekskluzive aŭ almenaŭ ĝenerale uzataj por sencoj adverbecaj (laŭ okcidentaj ideoj):

<i>nakanaka</i> = tre	<i>takusan</i> = multe
<i>oyoso</i> = plejparte	<i>zyūbun</i> = sufiĉe
<i>mina</i> = tute	<i>zehi</i> = certe
<i>dake</i> = nur	<i>moto</i> = origine
<i>amari</i> = tro	<i>hazime</i> = komence
<i>mada</i> = ankoraŭ	<i>naze?</i> = kial?
<i>mata</i> = denove	<i>mō</i> = jam

Jes kaj Ne

Al la supra grupo apartenas la sekvaj, tre gravaj esprimoj:

Sō de gozaimasu ka? = Ĉu tiel estas?

[*Sō de gozaimasu* =] Hai = jes

[*Sō de gozaimasen* =] Iie = ne

Grava rimarkigo: Por eviti miskomprenon, la lernanto bone agos evitante respondon per «jes» (*hai*) aŭ «ne» (*iie*): anstataŭ tiuj esprimoj oni ripetu la verbon pozitive (=jes) aŭ negative (=ne). Efek-

tive, la japanoj ofte jesas kiam eŭropanoj neas, ekz.:

Mada kaerimasen ka? = Ĉu (vi) ankoraŭ ne hejmeniras?

[*kaeru* = «reveni» t.e. hejmeniri!]

Hai! = «jes» signifas: tiel estas, t.e. ankoraŭ ne hejmeniras, t.e. *NE* por eŭropanoj. Oni diru do:

Mada kaerimasen!

aŭ

Kaerimasu!

laŭ la cirkonstancoj. La saman konsilon ni donas al japanoj kiuj lernas fremdan lingvon, inklude Esperanton.

La supra konsilo estas despli sekvena, ĉar ne ĉiam estas kontraŭe pri «jes» kaj «ne» en la japana kaj okcidenta uzoj. Kiam mi demandas japanon:

Tetudatte kudasaimasen ka? = ĉu vi ne bonvolas helpi? kaj li respondas

«hai!» (jes=jes mi helpos), li respondis «eŭropmaniere». Por tion bone kompreni oni komparu la du ekzemplojn ĵus menciitajn.

<i>Mada kaerimasen ka?</i> <i>Hai!</i> (japane)
Ĉu vi ankoraŭ ne hejmeniras? Ne! (Esperante)
<i>Tetudatte Kudasaimasen ka?</i> <i>Hai!</i> (japane)
Ĉu vi ne bonvolos helpi? Jes! (Esperante)

Japanoj respondas do «jes» aŭ «ne» ne laŭ gramatika sistemo sed la laŭ esperata respondo. Ĝenerale oni malŝatas doni negativan respondon, pro ĝentileco. Ĉar fremdaj lernantoj ne havas la eblecon alkitimiĝi al tia pensmaniero, ili bone faros sekvan nian supran respondon, t.e.

ili klopodos eviti respondon per «jes» aŭ «ne».

II. Tempaj kaj lokaj adverbaj substantivoj :

Certaj substantivoj estas uzataj adverbe ; ili alprenas tiuokaze iujn sufiksojn.

A) *Lokaj* adverbaj substantivoj estas substantivoj sekvataj de l' genitiva sufikso «no» :

Omote-no^① *Niŭa*^② = Antaŭa^① ĝardeno^②
Ura-no^① - *Heya*^② = Malantaŭa^① ĉambro^②

B) *Tempaj* adverbaj substantivoj ne estas sekvataj de sufiksoj, krom «wa» (=nominativo) :

asa = matene (*kesa* = hodiaŭ matene)
hiru = tagmeze aŭ tage
ban = vespere } (*konban* = hodiaŭ vespere)
kyō = hodiaŭ } (*yūbe* = hieraŭ vespere)
kinō = hieraŭ
asu aŭ *asita* = morgaŭ
asatte = postmorgaŭ

Novaj tempaj adverboj estas tamen formataj per certaj sufiksoj el simplaj substantivaj adverboj. Ekz. *MAI* (ĉiu-) kreas :

Mainiti = ĉiutage (el *niti* = tago)
Mainen = ĉiujare (el *NEN* = jaro)
Maiasa = ĉiumatene (el *asa* = mateno) ktp.

Aliaj sufiksoj ekzistas kompreneble sed ni ne povas ilin trakti tie ĉi pro manko de loko. Oni trovas ilin en ĉiu vortaro.

III. Aliaj adverbaj formoj

Al tiu ĉi grupo apartenas la adverba fleksio de l' adjektivo (-*ku*) (a) kaj la dativo de l' kvazaŭ-adjektivo kiu finiĝas kun (-*ni*) (b) (Kvazaŭ-adjektivoj finiĝantaj kun «no» ne estas uzataj adverbe. Ekz. :

Tōkyo (Tokio) *no* = Tokioa; *Tōkyo no hū ni* = laŭ Tokioa maniero : oni vidas, ke «*hū ni*» estas speciala propozicio anstataŭanta adverban sufikson).

(a) *La adverba fleksio de l' adjektivo.*

Aldonante la sufikson «-*ku*» al la radiko, ni formas la adverban fleksion de l' adjektivoj :

omosiroid = interesa ; *omosirodu* = interese
hayai = rapida ; *hayaku* = rapide ktp.
(b) *Dativo signifanta adverbegan ideon* :
makoto ni = vere
katte ni = libere, senĝene
teinei ni = ĝentile

✻

Krom la priskribitaj 3 kategorioj de adverboj ekzistas en la japana lingvo ankaŭ da adjektivecaj konstruoj kiuj ne estas facile sistemigeblaj :

1) Adverbo estas kelkfoje formata per ripeto :

dan = paŝo ; *dandan* = iom post iom
iro = koloro ; *iroiro* = diversmaniere

2) La subordinativo de l' verboj, precipe en la negativo, ofte korespondas al adverba esprimo :

hazimeru = komenci ; *hazimete* = komence
kaeru = reveni ; *kaette* = kontraŭe

3) Onomatopeoj-adverboj. El tiuj ekzistas grandega nombro en la japana lingvo. Ekz. :

kotikoti (ekz. sono de horloĝo)
patipati (ekz. manfrapado por aplaŭdo)
tonton (ekz. frapado ĉe pordo)
batabata (ekz. piedbruo sur planko)
dondon (ekz. tamburado)

(de p. 20)

plumon, ĉar kun tia subtileco, estas multaj vortoj pri kies signifo kaj uzado oni povus skribi tutan volumon.

Lingvo estas ilo por esprimi pensojn, ideojn. Bezonas liberecon por sinmovi, por sinesprimi. Dank' al Dio la internacia lingvo jam vivas, jam estas fakto, jam plenumas gravegan mision. Neniu kaj nenio evitos ĝian finan venkon. Per ĝi ni konstruu novan civilizon, novan kulturon tutmondan, fratecan, homaranan, feliĉoplenan. Jes, ni protektu la ilon : la lingvon ni respektu kaj *gardu ĝian fundamenton*, ni uzu ĝin kiel eble plej korekte. Ni estu *singardemaj kontraŭ la tro reformemaj*, sed ... *ni memoru la vortojn de nia Majstro* ... *Kial do kateni nin!*



Sub tiu ĉi rubriko ni informos nian ŝatatan Legantaron pri gravaj kaj interesaj okazajoj en la nuntempa Japanujo, aldonante samtempe kelkajn rimarkojn. (La Red.)

*

Japana eksigo el la Ligo

Antaŭ du jaroj en Ĝenevo, la japana delegito Josuke MACUOKA proklamis la japanan eksigon el la Ligo de Nacioj. La 27-an de Marto de l' nuna jaro, Japanujo definitive adiaŭis la Ĝenevan institucion. Japanujo estis unu el la plej fidelaj kunlaborantoj de l' Ligo depost ĝia fondiĝo kaj eĉ post la eksigo Japanujo kunlaboras kaj laboros por la tutmonda paco konforme al la spirito de l' imperia Reskripto proklamita en la tago de l' retiriĝo.

La ĉefa kaŭzo de l' japana retiriĝo estis pro manko de kompreno flanke de la Ligo pri realaj faktoj en la malproksima Oriento kaj pro la starigo de nia najbaro, la imperio de Manĉuko. Hodiaŭ la juna Imperio fartas sane kaj progresas normale. Manifestiĝas pli kaj pli amikaj tendencoj inter Manĉuko kaj aliaj nacioj: la transdono de l' Nord-manĉuka Fervojo (kies protokolon antaŭ ne longe oni jam subskribis) kaj la vizito de l' brita industria misiistaro al la nova Imperio, ktp.

Alivorte la sinteno de nia lando por la starigo de Manĉuko estas rekonita aŭ pli kaj pli rekonata de l' mondo. Rigardante tiun ĉi tendencon ĝenerale kaj rerigardante la grandan riskon faritan de nia nacio nur pro la paco en la Oriento, ni estas senlime kontentaj.

Sekvante Japanujon ankaŭ Germanujo re-

tiriĝis el Ĝenevo. Kun bedaŭro ni kons-tatas la grandan perdon de la Ligo. La sola rimedo por la Ligo por regajni sian prestiĝon estas rekonu kaj reformi siajn pasintajn erarojn, pli bone malfrue, ol neniam. Ni tie ĉi sincere esperas, ke la Ligo forigos antaŭjuĝojn kaj estos morale kuraĝa oficiale rekonu la novan ŝtaton, konsiderante ke Salvador jam rekonis Manĉukon, kaj ankaŭ unu el la plej potencaj membro-ŝtatoj de la Ligo morale rekonis la novan imperion, kaj faris publikan konfeson, ke Japanujo agis nur pro la dezirego por trankvileco en la Oriento kaj pro la neceseco de l' japana sin-defendo kaj absolute ne havis preterajn ambiciojn rilate al la starigo de Manĉuko.

☪

Manĉuka Imperiestro

La Imperiestro de Manĉuko atingis Jokohama per militŝipo HIEI, la 6-an de Aprilo, kaj tuj iris al Tokio. Li vizitis nian landon por saluti nian Imperiestron kun dankemo por la japana helpemo kaj deziro por plua amikeco. La manpremo de l' ambaŭ Imperiestroj en la japana ĉefurbo estas signifoplena evento, epokfara en la historio de la Oriento. Post tri-semajna restado Li forveturis al Manĉuko, de la haveno Kobe.

☪

B. H. Chamberlain

Basil Hall CHAMBERLAIN ĵus mortis en okdekjara aĝo, en Ĝenevo. La legantoj de O. I. jam bone konas lian nomon, same kiel ĉiuj studentoj de l' japana kulturo. Li estis inter la unuaj el inter la pioniroj de «japanologio» kaj preskaŭ ĉiuj postaj studentoj lernis ion de li. Nur 30 jarojn li havis kiam li verkis sian faman libron «Things Japanese» (Aferoj Japanaj) kiu estas kvazaŭ enciklopedio de l' pri-japana scio, en tre agrabla kaj interesege stilo.

Li verkis la unuan gramatikon de la japana lingvo por fremduloj kaj en iu tempo

li eĉ estis profesoro de la *japana* lingvo en la Universitato de Tokio (fakto hodiaŭ preskaŭ nekredebla!). Li verkis la unuan detalan gvidlibron pri Japanujo, kiun sekvis pli-malpli ĉiuj seriozaj geografoj. Li estis la unua kiu studis la lingvon de Ryūkyū kaj komparis ĝin al la japana. Li verkis la unuan detalan verkaron per romaj literoj kaj angla traduko kaj ĉiuj postaj vortaristoj ĉerpis el ĝi la bazon de siaj vortaroj. Unuvorte, B.A. Chamberlain akiris nemortemajn meritojn flanke de Japanujo.

Kaj nenio karakterizas la japanojn pli bone ol la fakto, ke ili estas dankemaj al Chamberlain malgraŭ tio, ke en la lasta parto de sia vivo li ne nur forlasis Japanujon sed eĉ turnis sin kontraŭ la japana spirito. Lia fama disertacio en kiu li klopodas malgrandigi Ŝintoismon montras tian mankon de kompreno ĉe Chamberlain, kiu estas nur klarigebla psikologie: ni ordigas niajn pensojn laŭ niaj sentimentoj. Kiam la koro de Chamberlain forturniĝis de l' japanoj, lia potenca inteligenta cerbo stariĝis sistemon de ideoj kiuj emis detruj la plej altan valoron iam produktitan de Japanujo, tiun de l' *pura ŝintoismo* (restarigo de l' pra-nacia kredo). KEYSERLING skribas ie, ke Chamberlain eraris, kiam li diris, ke Ŝintoismo estis enkondukita de la registaro ĉar se la registaro volus tiamaniere «enkonduki» Kristanismon, ĝi (la registaro) baldaŭ fiaskus.

Ĉu Chamberlain agis konscie aŭ senkonscie kontraŭ Japanujo, estas afero diskutbla sed ne decidebla. Kiaj internaj motivoj lin turnis kontraŭ la japana ideologio, kiu lin tiel ĉarmis dum siaj fruaj jaroj? Ni kredas, ke la kaŭzo estas sama kiel tiu kiu malvarmigas la amikecon al Japanujo ĉe preskaŭ ĉiuj fremduloj kiuj longe restadas en tiu ĉi lando: ju pli oni klopodas kompreni Japanujon pere de logiko (t.e. etimologia kaj filologia studo), des pli oni emas malsimpatiiĝi al ili — kaj eble reciproke.

La Interna Ideo de nia Esperanto estas vojo ekster-logika, vojo super-sciencia. Se Chamberlain, kiu sciis tiom da lingvoj!, estus preninta la etan penon ankaŭ ellerni *la nian*, li certe povus ekkapti la japanan spiriton per sia koro, ne nur per sia intelekto. Amo inter geedzoj kaj infanoj ne baziĝas sur logiko sed sur sentoj. La japana popolo estas familio: tiu konvinko estas enradikigita profunde en la koro de ĉiu japano. Zamenhof diris, ke la Homaro estas *unu granda rondo familia*: ideo tre komprenebla kaj plaĉa al ĉiu japano. Domage, ke Chamberlain tion neniam komprenis.

*

La ĵurnaloj anoncas, ke en Tokio okazis festa kunveno por memori Chamberlain, kiu forlasis Japanujon jam antaŭ 30 jaroj. La brita ambasadoro paroladis al 2,000 personoj, la elito de l' japana intelektularo. *Oomoto Internacia* ankaŭ ĉiam pagos siajn ŝuldojn al ĉiuj kiuj vole aŭ nevole kunlaboris al nia granda tasko!

☞

H a t i k o

HATIKO estas nomo de hundo, nomo konata kaj amata de centmiloj da japanoj. Dank' al specialaj cirkonstancoj, pri kiuj ni klarigos, HATIKO fariĝis la plej fama hundo en la tuta Japanujo. Jam dum sia vivo HATIKO havis statuon en Tokio. Kaj en marto de tiu ĉi jaro, kiam li mortis, HATIKO fariĝis kvazaŭ legenda estaĵo. Laŭ sia hunda maniero HATIKO esprimis la plej altan virton de la japana nacio: tiun de la lojaleco.

HATIKO ĉiutage kutimis atendi sian mastron, fortikan junulon, kiu revenis de sia laboro per vagonaro. Li kuris sur la peronon kaj bonvenigis sian mastron je la alveno. Kiam la posedanto de HATIKO soldatiĝis kaj foriris al Manĉuko, HATIKO fidele daŭrigis sian kutiman atendadon ĉiu-



Japanujo kaj Aŭstralio

tage, je la fiksita horo. Sed nun li ne bonvenigis la vagonaron kun laŭta, ĝojplena bojado: tirante siajn voston kaj orelojn li reiris hejmen, post kiam la lasta vojaĝanto eliris.

La mastro de HATIKO jam delonge dormas sub la neĝo de Manĉuko. Lojale li batalis por sia lando kun fideleco simila al tiu de HATIKO mem. Ni ne scias, ĉu lia spirito travagis la stacidoman kajon kiam HATIKO tien venis. Ni ne scias, ĉu nevideblaj, spiritaj manoj karesis iam la dorson de HATIKO. Sed ni scias, ke en la transmorta vivo HATIKO retrovis sian mastron ĉar fideleco *devas* esti rekompencata same kiel peko punata post la morto, en ĉiu okazo kiam la «pago» ne okazis surtere. Se estus alimaniere, la homaro devus memmortigi pro malespero...

*

Ni legis en materialisma ĵurnalo angla-lingva, ke HATIKO nur obeis mekanikan kutimon kiam li daŭrigis sian atendadon. Laŭ tiu ĵurnalo bestoj estas regataj de «kutimoj» kaj homo obeas «behaviorismon». La mastro de HATIKO mortis do pro tio, ke li ne povis fari alimaniere — laŭ la ĵurnalisto, kiu tamen ne kuraĝis tion klare esprimi.

Ni ne diskutas kun la angla ĵurnalo. Laŭ la vidpunkto de l' materio ĝi estas prava. Sed la ĵurnalisto kiu skribis tiun alineon estas *spirite* bilinda. Li ne scias, ke en aferoj spiritaj la signifo estas sole grava, ne la fizika klarigo de l' signifo! «Signifo kreas enhavon» — diris la granda germano KEYSERLING kaj milfoje li pravus. Se la «mekanika kutimo» de HATIKO elvokas admiron en miloj (eble milionoj) da animoj, tio estas fakto spirita treege atentinda. Se la «mekanika kutimo» flanke de hundo helpas plifirmigi lojalecon, kiu estas unu el la plej altvaloraj, ĝenerale homaj virtoj, tiam ni devas esti dankemaj al tiu speciale bon-aŭgura «mekanika kutimo».

Jes, niaj amikoj, ripeto de sciencaj esprimoj, popularigo de biologiaj aŭ aliaj terminoj estas unu afero; kompreno de psikologiaj, spiritaj fenomenoj postulas tamen pli ol la kapabloj de simpla, angla, materialista ĵurnalisto perdita en la Ekstremaĵoj...

Japanujo aĉetas de Aŭstralio ĉiujare grandegan kvanton da lano. Se oni scias, ke lano estas la ĉefa produkto de Aŭstralio kaj ke Japanujo estas la plej granda aĉetanto el eksterlandoj, oni povas facile kompreni la kaŭzon de l' japana-aŭstralia amikeco.

Komerco estas bazita sur profito (reciproka) sed krom tio ĝi havas aliajn, bonfarajn sekvojn. Ĝi helpas malgrandigi la mizeron de senlaboreco ne nur sur la foraj, aŭstraliaj kampoj kie oni bredas ŝafojn sed ankaŭ en la malriĉega japana distrikto nomata TOHOKU kie teksado savas de malsato milojn da buŝoj.

Estus bone, ke la advokatoj de «sendependa brita ekonomia bloko» meditu tiun ĉi poblemon. Japanujo aĉetas pli de la Brita Imperio ol ĝi vendas al ĝi kaj tute speciale en la kazo de Aŭstralio la komerca bilanco estas treege malfavora por japanoj. La diversaj kvotoj kaj malpermesaj dogan tarifoj praktikataj en Granda Britujo estas do konsiderataj en Japanujo kiel malamika sinteno kaj la tempo ne estos malproksima kiam la toleremo de l' japanoj ĉesos. Jam montriĝas simptomoj de kontraŭstaro kaj se oni ne volas, ke la internacia komerco tute ĉesu kaj la homaro revenu al barbara izoliteco de ĉiu lando (aŭ landogrupo), oni devas urĝe restarigi la liberecon de l' interŝanĝoj inter la nacioj.

Konsiderante la suprajn ideojn, Aŭstralio havas grandiozan rolon plenumotan en la mondhistorio. Se ĝi persvados la Britan Imperion, kies Dominio ĝi ja estas, por ke ĝi revenu al la principo de libera komerco (kies ĉefa partiano ĝi estis ĝis antaŭ nelonge!), Aŭstralio faros grandan servon ne nur al si mem sed ankaŭ al la paco kaj prospero de l' tuta mondo. Ni do salutas entuziasme la manifestigon de l' japana-aŭstralia amikeco kaj ne dubas, ke la komerca traktado inter la Aŭstralia Dominio kaj la Japana Imperio nuntempe preparata en *Canberra* (ĉefurbo de Aŭstralio) donos kontentiĝon al ambaŭ partioj,

Psika Esperantista Ligo

— AVOTO, Londono —

Multaj legantoj memoras mian artikolon pri «Spiritualismo en Britujo» en la oktobra numero de O.I. 1934, en kiu mi proponis la fondon de Psika Esperantista Ligo, kaj promesis raporti poste pri la progreso de tiu projekto. Mi nun havas la honoron informi ke la Ligo faris sufiĉe bonan komencon, kaj jam vekis favoran komenton en multaj gazetoj, ne nur en Esperantujo, sed ankaŭ en la angla, franca, nederlanda, portugala kaj bulgara lingvoj.

Min surprizis kaj ĝojigis la tutmonda intereso pri psikismo kaj spiritualismo, montrita per mia plenshopita leterujo. Kvankam en multaj landoj la monstro Materialismo jam profunde mordis en la vivon de la popoloj, estas tre kuraĝige trovi komprenantojn ĉie pretajn por kulturi la spiritan flankon de la homa naturo. Estas nur necese interrilatigi ilin pere de centrigita organizo, por multoble fortigi ilian voĉon, kaj tia estas la funkcio de PEL.

Por klarigi la terenon, en kiu la Ligo agadas, kaj por eviti eblajn miskomprenajojn, necesas antaŭe difini uzotajn terminojn. Ekzemple nia difino de la vorto **Psikismo** estas jena: «Okupado pri ĉiaj aferoj, kiuj rilatas al la animo, la spirito, kaj la nemateriaj aspektoj de la universo.» La psikisto tial povas interesiĝi pri multaj temoj; inter aliaj religio, psikologio, hipnotismo, spiritismo, spiritualismo, homa radiado aŭ magnetismo, karaktero, etiko, filozofio, telepatio, inspiro, psikometrio, postmorta vivo, somnambulado, klarvido, klaraŭdo, reenkarnejo, teozofio, fantomaperoj, halucinoj, okultismo, profetado, psika kuraco, sonĝoj, ktp., ktp.

La **Psiko** estas la sumo de la nemateriaj karakterizoj de homo, same kiel la **Fiziko** estas la sumo de liaj materiaj karakterizoj. Kiam oni diras ke iu homo havas bonan fizikon, aŭ estas fizike forta, oni intencas kompreni ke lia materia korpo estas bone evoluinta kaj taŭgas por utila servo al ĝia posedanto. Same kiam oni diras ke iu havas bonan psikon, aŭ estas psike forta, oni priparolas ties nematerian korpon, komprenigante ke ĝi funkcias kapable eĉ dum la tera vivo.

La ĝenerala celo de la psikisto estas eltrovi kaj studi la leĝojn kiuj regas la psikan vivon; esplori kaj se eble plibonigi la rilatojn inter la fizika kaj la

psika medioj de homa ekzisto; kaj scienco ordigi la pruvojn pri la kondiĉoj de ebla postvivado, por ke la homo povu pretige orienti sian teran vivon plej konvene por la progreso.

Oni notu ke tiaj aferoj, kiaj estas numerologio, astrologio, kabalismo, ludkarta divenado, nekromancio, ktp., ne troviĝas en la supra listo de psikaj interesoj. Ni estas ankoraŭ ne konvinkitaj ke ili konformas al nia difino de la termino Psikismo. Tamen la membroj de PEL rajtas libere diskuti tiun punkton se ili volas.

Jen do la sufiĉe vasta kulturejo en kiu laboros la «gepelanoj.» Pensuloj en preskaŭ ĉiuj landoj jam dediĉis multe da tempo kaj cerbumo al la studo de psikaj problemoj, kaj al la observado de psikaj fenomenoj. Sed ekster la landlimoj iliaj voĉoj ofte ne aŭdiĝis. La precipa celo de PEL estas konstrui ponton, per kiu iliaj konkludoj fariĝos komuna propraĵo.

La organizo de PEL estas tre simpla. La Ligo konsistas el (1) Administranto (kiu estas samtempe sekretario, kasisto, redaktoro, kaj ĝenerala servanto), (2) Naciaj Agentoj, kaj (3) ordinaraj Membroj.

Estas nenia deviga aŭ fiksita kotizo, por ke eĉ la plej malriĉa interesato povu partopreni la laboron. La efika disvolviĝo de la Ligo dependas sole de la memvolaj donacoj de membroj kaj aliaj simpatiantoj. Tiujn donacojn ni oficiale kvitancas. Je taŭga periodo ni invitos al la ligoj ke ili elektu du personojn por kontroli la kontaron.

Oni postulas la plenumon de nur unu kondiĉo al kandidato por dumviva membreco de la Ligo, nome ke oni jese subskribu la jenan kvaroblan deklaron: —

(1) Min interesas psikaj aferoj, kiujn mi opinias internacie gravaj.

(2) Mi scias la internacian lingvon Esperanto sufiĉe por ĝin legi kaj skribi.

(3) Mi volas subteni ian klopodon por plivastigi intereson pri psikaj aferoj inter ĉiulandaj esperantistoj, kaj por kreskigi amikecon inter la jam interesitaj; tial mi petas registron kiel dumviva memoro de PEL.

(4) Mi klopodos laŭeble varbi novajn membrojn,

aboni ian gazeton kiun oni povos eldoni por antaŭenigi la laboron de la Ligo, subteni la Ligon per mono laŭ la grandeco de miaj rimedoj, kaj helpi laŭ iu alia maniero kiu sin prezentos al mi.

Konsento pri tiu deklaro estas sufiĉe simpla kaj larĝbaza atesto pri la seriozeco de iu esperantistopsikisto, lasante al li aŭ ŝi plenan liberecon de agado. Iu leganto kiu konsentas la deklaron kaj deziras membriĝi, devas nur sendi al mi preslitere sian plenan nomon, poŝtaŭ adreson, profesion, kaj noton pri oficoj, spertoj, fakoj de psikismo kiuj speciale interesas lin, ktp., por ke mi povu kompletigi la registron. Se oni sendas monon, bonvole pagigu ĝin simple al PSIKA ESPERANTISTA LIGO, ĉar la Ligo havas propran konton ĉe banko. Oni povas ankaŭ helpi la kason enmetante internacian respondkuponon se oni deziras respondan leteron. Certe mi multe preferas leterojn ol poŝtkartojn, ĉar ili estas pli facile bindeblaj en leterujo, kaj ordinare povas esti legataj sen malbindo. Malgraŭ tio, mi kompreneble ne rifuzas respondon al poŝtkartoj.

Ĝis la komenco de februaro mi registris dudek membrojn en ok landoj: Anglujo, 9; Brazilo, 4; Hungarujo, 2; Skotujo, 1; Irlanda Liberŝtato, 1; Polujo, 1; Francujo, 1; Bulgarujo, 1. Krom tiuj landoj, korespondado transiras inter mi kaj interesatoj en Japanujo, Hispanujo, Nederlando, Usono, Germanujo, Aŭstralio, kaj Sovetio.

Mi deziras publike kvitanci la jenajn donacojn: AWT, 25s; RMB, 20s; WET, 12s 6d; HRV, 8s 6d; JBP, 5s; MT, 3s; AWSR, EEFM, MJOK, po 2s 6d; MEM, 1s 6d; JMM, TPP, ET, po 1s; sumo £4:3:0 El tiu sumo, 58s venas el Anglujo, 20s el Irlanda Liberŝtato, kaj 5s el Skotujo.

La elspezoj ĝis sama dato estas jenaj: libroj, skribilaro, stampilo, ktp., 18s 10d; afrankoj, 8s 10d; reklamo, 1s 8d; sumo, £1:9:4. Tio lasas saldon ĉe mi kaj ĉe la banko de £2:13:8. Tio estas kontentiga, sed ne sufiĉa por starigi gazeton aŭ bultenon, nek por multe reklami per presitaj folietoj.

Mi bezonas la kooperadon de ĉiu bonvola psikisto por sukcesigi la Ligon. Multe da laboro estas entreprenota kiam la kaso permesas; estas dezirinde ne nur fondi gazeton, sed eldoni psikan terminaron kaj tradukojn de bonaj psikaj libroj. Mi kredas ke Dio nepre benos tian klerigan laboron por la homaro, kiun gvidas la ĉielirinta Johano Pollen, kiu estis mem dum la tervivo lerta psikisto. Mi petas al ĉiu interesato komuniki al mi, adresante la koverton preslitere: BM/AVOTO, LONDON, W.C.1, ANGLUJO.



Pri Ateismo en Sovet-Ruslando.

«La ateisma volo de l' Soveto vokas kontraŭ ĝi certajn sincerajn kredantojn. Mondo sen Dio nur povas iri al ruiniĝo, ili pensas; nur al pereco, homaro sen kultoj, sen pieco, sen preĝoj... Kial tiuj ĉi piaj spiritoj ne persvadas sin mem ke oni nur povas forigi falsajn diojn?! La adorbezono loĝas en la fundo de l' homa koro.»

A. GIDE, *Taglibro*.




Minimumo de Metafiziko

«La nuntempaj filozofoj volonte kaj malmodeste sin gloras anoncante ke siaj sistemoj nur utiligas minimumon de metafizikaj postulatoj. La kritikistoj de Kant evidente faris sian laboron. Oni ne ŝatas metafizikon, oni ne fidus ĝin, oni hontas pri ĝi kaj oni fuĝas ĝin. Kaj se estas neeble ĝin fuĝi, oni provas pravigi sin klarigante ke oni nur rilatiĝis al ĝi ĉar oni ne povis fari alimaniere, kaj nur laŭ la grado de l' absoluta neceseco. Sed ĉu vere estas tiel nekonvene esti en rilatoj kun la metafiziko? La antikvaj metafizikistoj tute ne hontis pri ĝi kaj ne fuĝis ĝin kiel facilmoran personon. La «minimumo de metafiziko» estas, laŭ ilia kompreno, timema kaj ridinda limigo. Cetere estas verŝajne, ke la metafiziko mem ne ŝatas timemulojn kaj tiujn kiuj estas tro atentemaj pri sia reputacio. Platono kaj Plotino kiuj estis ĝiaj favoratoj, aspiris maksimumon de metafiziko. Sekve, kvankam oni daŭre kritikis kaj refutas ilin, oni tamen sŭskultas iliajn instruojn.»

Leono CHESTOV

Literatura Kritiko



«OOMOTO INTERNACIA meritas atenton kaj simpatian ĉar inspirita de nobla toleremo ĝi preparas larĝan vojon, kies perspektivoj promesas harmonian kunlaboron. Jen tial mi estas ĝia sincera amiko.»

Julio BAGHY

En la februaro-marta numero de **Literatura Mondo** aperis stranga «deklaro»: temas pri pacdeklaro de s-ro Bleier kaj D-ro J. Takács kiuj ŝajne interdisputis antaŭe. La kaŭzo de tiu disputo estis ĉefe, se ni ne eraras, artikolo kiun D-ro Takács siatempe aperigis en nia gazeto.

Kiel ni ofte ripetas, Oomoto Internacia ne estas responda pri la opinioj de la kunlaborantaro. Ĉiuj gazetoj, ja ankaŭ Lit. Mondo opinias same. Ni do ne komprenas, kial Lit.Mondo atakas la gazeton mem pro la opinioj de D-ro Takács. Cetere ni rimarkigas, ke ni aldonis redakcian noton al la menciita artikolo, en kiu ni esprimis la deziron, ke la bojkoto proponita de D-ro Takács ne estas necesa. Konsekvence, ne nur ni *ne* pekis kontraŭ la neŭtraleco sed eĉ klopodis mildigi la opini-diferencojn. En tiu ĉi loko ni volonte deklaras, ke la ĵus menciita redakcia noto estis aldonita de nia tiutempa redaktoro, s-ro J. Major.

Ŝajnas tamen, ke Lit. Mondo konsideras s-ron Major kiel malamikon. Sub la «Deklaro» aperinta en la februaro-marta numero de Lit. Mondo aperis stranga noto, en kiu oni atakas la personon de nia eksiginta redaktoro:

«Pro recenzo aperinta en O. I. Literatura Mondo devis decidi bojkoton kontraŭ ĝi. Je tiu bojkotdecido O. I. kvar monatojn poste, en la numero februaro 1935, respondas — laŭ stilo de Major — longe kaj per strangaj argumentadoj pri ni. Nu, la konsciencon kaj atentemon de s-ro Major al la vero pruvas «plej elokvente la supra aranĝo de alia artikolo, samloke aperinta. Sed ĉar s-ro Major

en la sama numero raportas pri sia ekŝigo el «la redaktora funkcio pro certaj kaŭzoj, ĉi tie «ne priparolendaj, ni ne plu daŭrigas polemikon kaj esperas, ke O. I. mem ĝojis liberiĝi «de sia redaktoro.»

La Redakcio de Oomoto Internacia estas surprizita pro la malicaj aludoj, kiujn entenas la supra artikolo kontraŭ la persono de s-ro J. Major. Ĝi siavice *deklaras* kiel sekvas:

- 1.) Respondo «laŭ stilo de Major» ne estas malaprobinda ĉar tiu stilo estas ofte laŭdata kiel modela (laŭ leteroj ricevitaĵoj de diversaj laudoj).
- 2.) Ni respondas «longe», se tio plaĉas al ni, ĉar ni disponas pri sufiĉe da spaco. Nome, ni regule aperas 12 foje en la jaro sur 32 paĝoj ĉiujfoje. Ankaŭ en tiu ĉi rilato ni ne timas komparon al Lit. Mondo.
- 3.) Ni varme aprobas tion, kion Lit. Mondo diras pri la konscienceto de s-ro Major. Dum sia kunlaborado al O.I. li ĉiam plenumis sian devon plej konsciencie pro kio ni estas dankemaj.
- 4.) Ni indigne protestas kontraŭ la noto de Lit. Mondo. Ekzistas neniu kaŭzo por la ekŝigo de s-ro Major krom la kaŭzo publikigita en lia «Cigna Kanto» (O.I. februaro): profesia okupiteco. Ni certe ne ĝojis pro lia foriro sed kontraŭe, bedaŭris tion kiel nia ĉefredaktoro klare skribis en la sama numero de nia gazeto.

Konklude, ni sincere bedaŭras, ke Lit. Mondo volas puŝi pure literaturan diskuton pri la libereco de la kritiko kaj la pureco de nia lingvo al kampo personeca kaj disputa. Ni rifuzas sekvi ĝin kaj senhezite daŭrigos nian vojon, kiel en la estinto, tiel en la estonto, por la bono de Esperanto.

La Redakcio de O. I.

Literatura Mondo kaj Ni

Estas strangege fako, ke kvankam Lit. Mondo fiere bojkotas nin, ĝia eldonisto plurfoje sin turnis al ni lastatempe, petante diversajn favorojn. Por montri al s-ro Bleier nian helpemon, ni konsentas publikigi liajn lastajn leterojn kune kun la «pac-kontrakto» inter s-ro Bleier kaj Dro. Takács.

Antaŭ ĉio ni devas publikigi la unuan leteron de s-ro Bleier, sen kiu la afero ne estas plene komprenebla. Jen ĝi estas:

*

Budapest, 12an de februaro 1935

Tre estimataj Sinjoroj!

Ni ĵus sciigis, ke s-ro Jozefo Takács sendis por la Oomoto Internacia duan grandan artikolon, temantan pri nia eldonejo kaj redakcio.

Ĉar ni havas la fortan supozon pri tio, ke ĉi tiu artikolo estas ankoraŭ pli plena per kalumniaj kaj ofendaj asertoj, ol la antaŭa, aperinta en O.I. oktobro 1934. Ni petas vin, bonvolu afable kaj poŝtrevene, per flugpoŝto laŭ la aldonitaj respondkuponoj, alsendi al ni la kopion de tiu artikolo. Ĉu vi tion presigos en Oomoto Internacia aŭ ne, estas via afero. Sed ni opinias, ke estas via devo — devo de ĉiu honestulo — ebligi al ni, ke pro mensogaj kaj kalumniaj asertoj ni povu procedi kontraŭ skribanto de iu ajn artikolo. Ni estas forte konvinkitaj, ke ĉiuj nelojalaj atakoj kontraŭ ni eliris ne per via iniciato kaj do ni estas same forte konvinkitaj, ke vi faros al ni tiun minimuman komplezon: sendi al ni la precizan kaj ne kripligitan tekston de la artikolo.

Ni estas certaj pri tio, ke vi volas havi same la justecon, kiel ni mem kaj do vi ne malhelpos, ke ni povu ekzameni tiun artikolon el nia vidpunkto. Kompreneble, se ĝi estas jam dume aperinta en Oomoto Internacia ni ne bezonas la kopion, krom en tiu okazo, se vi ne publikigis ĝin plene. Se antaŭ publikigo vi forstrekis partojn, tiam ni petas sendi al ni la forstrekitaĵajn partojn.

Ni denove ripetas, ke ni estas konvinkitaj, ke vi volas agi kontraŭ ni kiel honestaj homoj kaj ne rifuzos plenumi tiun rajtan peton.

Literatura Mondo, Bleier

*

Rimarkoj de la Redakcio: Kiel la afabla Legantaro bone konjektos, ni ĝentile rifuzis la peton de s-ro Bleier esprimitan en la supra letero. Efektive, nia gazeto ne havas la kutimon akcepti cenzu-

radon flanke de iu ajn eksterulo.

La dua letero ricevita de s-ro Bleier tekstas kiel sekvas:

*

Budapest, 14. 3. 1935.

Al la redakcio de Oomoto Internacia,
Kameoka, Japanujo.

Samkoverte letero kaj deklaro de s-ro Takács. Laŭ mia promeso al li, ankaŭ mi volas akcente alvoki vian atenton al la plenumo de tiu lia peto. Ĉar sinjoro Takács asertis en lia artikolo aferojn ne korespondantajn kun la vero kaj aliparte tiajn, kiuj plene taŭgas por elĉerpi la kriterion de kalumnio, li tre deziras tiujn korekti por pruvi, ke li nur erare diris tiujn. Miaparte mi supozas, ke ankaŭ vi nur atendis okazon por korekti tiajn tonon kaj frazojn, ne taŭgajn en lingva diskuto. Ĉiukaze mi volas esperi jam pro la reputacio de Oomoto mem — kiu estas miasupoze finfine porpaca kaj ne pormalpaciga movado — ke vi rapidos publikigi sen ĉikanaj komentoj tiun deklaron, des pli, ĉar la nepublikigo aŭ tiaj komentoj nur helpus firmigi aserton de iuj, laŭ kiuj O. I. ne atentis veron kaj fakton, sed ĝi mem trovas plej bone sin reklami per liaj ajn, eĉ per kalumniaj kaj mensogaj artikoloj. Mi ne kredas tion kaj forte esperas, ke vi pravigos mian diron, laŭ kio la kulpa por tiaj ŝajnoj estas ne la redakcio de O. I. mem, sed la karaktero neriparebla de ĝia pasintjara redaktoro.

Bleier Vilmos

*

*

Redakcia Noto: Ni sincere esperas, ke s-ro Bleier ne konsideros niajn notojn kiel «ĉikanajn komentojn». Efektive, ni faras nenian komentojn sed kontentigas malkovrante la originalajn tekstojn. Nia eksredaktoro siaflanke deziras rimarki la sekvantaĵojn:

**Respondo al malica aludo de libro-
eldonisto Bleier:**

Estas al mi granda plezuro ke tia homo kia estas libroeldonisto Bleier [trovas mian karakteron neriparebla.

Jozefo Major.

(Kritikisto).

Plie, la Redakcio de Oomoto Internacia esprimas sian bedaŭron, ke la persono de s-ro Jozefo Major estis ofendata pro aferoj redakciaj. La reputacio de s-ro Major kiel esperanta verkisto estas tamen tiel

granda, ke ni ne bezonas lin defendi: la Esperant-istaro juĝos.

Fine, ni publikigas la DEKLARON:

*

D e k l a r o

en la konflikto inter dr. Jozefo Takács kaj Vilhelmo Bleier

Pri la pluevoluado de la lingvo, formigo de novaj vortoj kaj ilia popularigo okazis bedaŭrindaj miskomprenoj inter la du nomitaj sinjoroj. Ĉar ili konstatis reciproke, ke la miskomprenoj baziĝis parte sur falsaj informoj, aliparte sur la malĝustaj konsekvencoj, tiritaj el ĉi tiuj falsaj informoj, ili deklaras, sian intencon — pro la intereso de la movado — pace aranĝi la aferon. Tial:

S-ro Dr. Jozefo Takács deklaras, ke en la 1934-a oktobra numero de Oomoto Internacia en la artikolo pri la Unueca uzo de l' vortprovizo li faris tiajn asertojn kaj konstatojn, kiujn sinjoro Bleier kaj Literatura Mondo povis trovi ofenda kaj por la entrepreno materiale malutiliga. Ĉar tiuj asertoj baziĝis parte sur falsaj informoj, aliparte transpaŝis la kadrojn konvenajn en lingva diskuto kaj ĉar li volis nek ofendi, nek materiale malutili, li retiras tiujn asertojn kaj esprimas sian bedaŭron.

S-ro Vilhelmo Bleier deklaras siaparte, ke post la lego de la romita artikolo, en sia momenta indigniĝo skribis leteron al s-ro d-ro Jozefo Takács, en kiu li uzis esprimojn, kiujn la adresito trovis ne nur ofendaj, sed iujn el ili eĉ ne korespondantajn kun la faktoj. S-ro Bleier retiras tiujn asertojn kaj esprimas sian bedaŭron.

Budapest, 8an de marto 1935.

Antaŭ ni kiel atestantoj:

Julio Baghy p. m. Dr. Takács József p. m.
Kolomano Kalocsay p. m. Bleier Vilmos p. m.

*

Kaj nun ni tutkore kondolencas al la disputantaj partioj. La disputo ripozu en paco. Sed la libera kritiko vivos en Esperantujo tiel longe kiel Oomoto Internacia aperos. Kaj ĉiuj signoj montras, ke ĝi neniam ĉesos... aserto, kiun ni hezitus fari pri aliaj eldonadoj.



Pripensindaĵo por Liberpensuloj.


«Mi rifuzas vidi veran kritikan spiriton en ĉiu skeptikismo ekzercata nur en unu direkton. Kia alia kaŭzo estas ol tiu de memintereso, kiu akceptigas tiujn ĉi raportojn pli volonte ol tiujn? Kiamaniere formi al si opinion pri faktoj tiom suspektindaj? Kiel ne suspekti, malantaŭ tiu ĉi modelado al opinio, iun falsigon, ĉar oni nur konsentas lumigi unu flankon de l' problemo?»

A. GIDE, Taglibro.



«Se la muroj havas orelojn por aŭdi tion, kio ne decas, ili devas havi ankaŭ buŝon por anonci ankaŭ belan Idealon.»

Ismael Gomes Braga.



La bildo montras la domon de nia plej malproksima kunlaboranto s-ro I. G. Braga (Brazilo), antipodano de Kameoka.

La vorto «LAR» sur la muro signifas HEJHO. La domo estas nomata ESPERANTO-HEJMO, ĉar ĉiuj en ĝi estas geesperantistoj.

Enhavo

Mikado kaj parlamento	3	Pri la fundamenteco de Esperanto	20
Lojareco kaj patriotismo	4	Paĝo de spiritismo :	
Orienta filozofio (4)	6	Promeso al spirito	21
Ora spegulo	8	Japana lingvo por Esperantistoj (32)	24
Komence estis la vorto	10	Japana kroniko	26
Animo rilatas kun korpo	12	Psika Esperantista ligo	29
Japanujo (7)	15	Literatura Kritiko	31
«Tango no Sekku» aŭ Festo de la kuaboj	18	Literatura Mondo kaj Ni	32

KORESPONDADO

Anonceto kostas 2 respondkuponojn (ĝis 3 linioj).

Abonanto de O. I. rajtas senpage publikigi anoncetojn dufoje en la jaro.

Mallongigoj: L=letero, PK=poŝtkarto, PI=poŝtkarto ilustrita, PM=poŝtmarko.

S-ro Lourival Cunha, Alagoinhas, Bahia, Blazilo, deziras interŝanĝi PM. Respondo akurata.

Deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi PI, PM. Certe respondas. S-ro Taturu Dôke, Tati-mati 80, Sendai, Japanujo.

S-ro Farand Denis (25-jara), Avenue d Avignon, Chateurenard de Grovende, Francujo, deziras korespondi kun la tuta mondo por interŝanĝi PM, PI. Certe respondas.

Kun japana gesamideano deziras korespondi — f-ino Jean Peart, Newman St., Moorooka. Brisbane, Queensland, Aŭstralio.

Deziras korespondi kun ges-anoj el la tuta mondo, pri linoleumo- kaj lignokliŝo-presajoj, kaj interŝanĝi presajojn. S-ro E.M. Kelly, Clarkson, Ontario, Kanado. Respondo Certa.

F-ino J.A.Hofstra (p/a S-ro K. R. Okkinga), Herbijum Bij Franeker, Friesl., Nederlando, dez. koresp. per PI, L, kun Brazilo, Ĉilo, Ĉinujo, Grekujo, Hindujo, Hinda-ĉinio, Irako, Kolombio, Kongolando, Koreujo, Kubo, Manĉuko, Novzelando, Persujo, Sudafriko, Turkujo. Resp. garant. almenaŭ unu fojon al ĉiu!

S-ro Inori-Toyomi, Munsyu-Densin-Denwa-Kabusiki-Kaisya Eizenka, Tairen, Nipponlando — deziras korespondi kaj interŝanĝi PI kaj PM kun ĉiu lando. Respondo garantiata.

INTERŜANĜO

Ni interŝanĝas reklamon kun tutmondaj Esperanto-gazetoj. Dezirantoj sendu al ni anonctekstojn. Ni estas ĉiam pretaj por reciproka servo.

«Oomoto Internacia»

Post Tralego . . .

Kio al vi plej plaĉas — Kio malplej plaĉas — Kio mankas, en «Oomoto Internacia»?

Anticipan dankon por via komuniko!
La Redakcio de O.I.

OOMOTO INTERNACIA

Abontarifo :

Unujara abono = 5 sv.fr., aŭ egalvaloro.
Subtena abono = 20 sv.fr., por 5 jaroj.
Dumviva abono = 50 sv.fr.

Anonctarifo :

Reklamo : 1 paĝo = 30 sv.fr., 1/2 paĝo = 15sv.fr.
Anonceto : ĝis 3 linioj = 2 respondkuponoj.

Monon sendu per poŝtmandato, se neeble, per monbiletoj aŭ respondkuponoj, rekte al la Adm.:
Oomoto Internacia, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo.

定價 壹部 貳拾錢 壹ヶ年貳圓四拾錢


昭和十年五月一日印刷 昭和十年五月一日發行
編輯發行印刷人 高木鐵男 京都府南桑田郡龜岡町
荒塚字内丸一

印刷發行所 天聲社 (振替大坂75917番) 全

Oomoto-Presejo, Ten'on-kjo, Kameoka

Oomoto-Fotalbumo

*Bildperspektivoj de Oomoto. 200 fotografu-
rajoj sur luksa papero kun esperanta kaj ja-
pana klarigoj. Formato: 29x37 cm. Prezo:
20 sv. fr. (kun sedkosto). Limigita eldon-
nombro, bibliografia maloftaĵo. Mendu ĉe:
Librofako de «Oomoto Internacia», Kameoka,
Japanujo.*



Jen kritiko de s-ro Teo Jung, redak-
toro de «Heroldo»:

«Vere grandioza, belega Albumo! Mi ne
«scias, ĉu unue vin danki, gratuli aŭ laŭdi
«pri tiu vere admirinda eldonaĵo. Ĝi sen-
«dube estas la plej bela libreto, ĝis nun
«eldonita kun Esperantaj klarigoj.

«Kun granda intereso miaj familianoj kaj
«ankaŭ multaj vizitantoj jam kelkfoje tra-
«rigardis la Albumon, legis la klarigojn ktp.
«Oni ne povas ne miri pri la multaj talen-
«toj de s-ro Onisabro Deguĉi, oni devas
«miregi pri la belaj domoj, temploj, parkoj,
«mebloj, pri ĉiuj plej diversaj instalaĵoj.
«Mi ne imagis, ke via movado jam tiom
«progresas en Malproksima Oriento...»

NIAJ REPRESENTANTOJ

Aŭstralio S-ro L. Thomson,
c/R; Rawson, 169 Exhibition
street, Melbourne.
Aŭstrujo D-ro Carl Mimler,
Wien VIII, Albertgasse 1-a,
S-ro Bernhard Selzer,
Etteneichgasse, 4, 31 Wien X
Brazilo S-ro Majumi Kondo,
Caixa postal 3594, S. Paulo.
Bulgarujo S-ro Ivan Kirov,
Popska, 484 Sliven.
S-ro Georgi Donĉev,
str. oficerska 25, Tirnovo.
S-ro Atanas Nikolov,
Sevlievo, Burgas.
Ĉeĥoslovakujo S-ro Rudolf Burkert,
Kalvariengasse 34-IV, Nie-
mea.
S-ino Sofie Cipera,
Plzen III, Zizkova 52.
Francujo S-ro Simon Frantz, 21, rue
Alain Chartier, Paris XV.
Germanujo S-ro Kurt Wuensche,
Augustenstr. 17, Leipzig-R.

S-ro Anton A. Ehm,
Zittau. Sa., Bahnhofstr. 32.
S-ro Gottlieb Strofsner,
Munchen S. 50. Bavarujo,
Dietsramszellestr. 10. 21.
S-ro K. O. Schmidt,
Brixstr. 8 a, Flensburg.
S-ro F. Bachmann,
Bahnhofstr. 3/1. Heilbronn.
Ĥindujo S-ro Liem Tjong Hie,
Semarang, Karangtoeri 66,
Java.
Hispanujo S-ro Francisko Miralles,
Hellin (Albacete).
S-ro Salvador Viladelmas,
Colon 52-54, Sabadell (Bar-
celono).
Hungarujo S-ro Paŭlo Balkanyi,
Poŝto 507, Budapest.
Ĥinujo S-ro Sh. M. Chun,
N.Y.M.S. Lunghuwa, Shanghai.
Italujo S-ro Luigi Minnaia,
Via del Giglio 16, Roma 115.
S-ro Giulio Matuella,
Corso Garibaldi 325,
Mazzolombardo (Torento).

Jugoslavujo S-ro Marko Dominia,
Split Zrinjska Str. No I d
Latvujo S-ro Karlo Subergs,
Riga, Milgravis azera
str. 6--1.
Litovujo S-ro Andrius Borkauskas,
Pakruojaus g. 3. Radviliškia.
Nederlando F-ino G. de Waart,
Box 23, Hilversum.
Novzelando F-ino Coralie Smythson,
47A Aurora Terrace,
Wellington, C. 1.
Persujo S-ro Dariusĉ Nemseĉi,
Tabriz.
Polujo S-ro Adolf Oberrotman,
Varsovio, Krak—Przedm 10
S-ro Denysiuk Les,
Bolechov, ul. Stryjska 12.
Svisujo S-ro Karl Jost,
Stolzesstr. 7, Zurich 6.
Usono S-ro John Lester Lewine,
150 E. 72 nd. St. New York
S-ro K. A. Suzuki,
Orange Petroleum Co. Ora-
nge (Texas)

FRANCA ESPERANTISTO

Oficiala organo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto.

Aperas Monate. Jara abonprezo: 25 fr. frankoj.

Specimeno: kontraŭ I resp. kupono.

Sendu la abonojn al:

F-ino BONNET,
12 Place D' Anvers,
Paris 9e, Francujo.

Monata organo de la Esperanta movado en Jugoslavujo

LA SUDA STELO

estas tre moderne redaktita, ilustrita esp. gazeto kun valora enhavo kaj certe meritas internacian subtenon. Jarabono por eksterlando: 5 sv. fr. aŭ egalvaloro. Petu specimennon kontraŭ resp. kupono.

«La Suda Stelo»,
Slavonski Brod, Jugoslavujo.

Ĉu vi kredas, ke scienca literaturo estas malfacila?

Vi certe modifos tiun opinion post legado de la popularscienca

SCIENCA GAZETO

dumonata, regule aperanta. Pligrandigita, ĝi nun aperas sur 20 dense presitaj paĝoj kaj kovrilo. Pluan pligrandigon ni projektas. Jarabono: Unu dolaro. Specimeno kontraŭ resp. kupono.

Amerika Esperanto-Instituto,
556 State St., Madison, Wis., Usono.

Ekde januaro 1935 ĉiumonate aperas

«VERDA REVUO»

sendependa, esperanto-gazeto pri arto, scienco kaj amuzo, sur 8 grandformataj paĝoj kun ilustraĵoj. Sendu jarabonon de 3 sv. fr. al la Adm.: Wien VII, Hermannsgasse 31/26, Aŭstrujo.

Sendependa organo libera por ĉiuj

Nia Gazeto

monata, jurnalforma, okpaĝa, ilustrita, zorge redaktita. Interesa kaj varia enhavo. Direktoro: G. Avril. Redaktoro: S. Grenkamp. Jarabono: 3 sv. fr. Specimeno kontraŭ resp. kupono. Red. kaj Adm.: 29, Av. de la Victoire, Nice, Francujo.

Heroldo de Esperanto

La sola, semajna, sendependa, universala, ilustrita organo de la Esperanto-movado. 4-8 paĝa, taggazeta formato, kun 7 specialaj aldonoj por ĉies gusto. Jarabono: 10 gmk.

Monata Heroldo

Esperanto gazeto por komencantoj kaj por malriĉuloj. Multaj interesaj artikoloj kaj bildoj. 10 paĝoj en la formato de semajna Heroldo. Jarabono: 2 gmk.

Specimeno kontraŭ resp. kupono.

Heroldo de Esperanto, Köln Brüsseler
Str. 94, Germanujo.

